Sekvos Ĝenerala Asembleo de
ESPERANTO FRANCE-EST

ECOLONIE estas eŭropa kampara kaj internacia feriejo
Nederlandanoj kreis ĝin kaj nun zorgas pri ĝi (vizitu la tt-ejon : www.ecolonie.org)

PROGRAMO

- Vendredon, 11an de aprilo
- 18a : akcepto de la unuaj staĝanoj
 - 19a : vespermanĝo
- Sabaton, 12an de aprilo
- ekde la 8a : matenmanĝo
 - 9a30 ĝis 12a : malkovro de ECOLONIE gvidata vizito kun klarigoj
 - ekde la 12a : tagmanĝo
 - 14a ĝis 14a30 akcepto de la lastaj staĝanoj
 - 14a30 : ĝenerala kunveno kun prezentado de la staĝoprogramo, landoj kaj urboj de la ĉeestantoj...
 - de 15h ĝis 17h30 : kursoj aŭ prelego **prelego** de Armand HUBERT : instruado
 - 17h45 : **deklamado** de ROBERTO
 - 19a : vespermanĝo
 - 20a30 : **distra vespero** : ni ne sufiĉe bone konas la riĉecon de nia esperanta repertuaro → prezentado de Armand Hubert + ebleco fabriki "rev-kaptilojn" (5 eŭroj kromaj kaj ne pli ol 15 homoj)

Dimanĉon, 13an de aprilo

- ekde la 8a : matenmanĝo
 - de 9h30 ĝis 11h : kursoj kaj prelego
- Prelego : Lydia BLOCH prezentos asocion, kiu helpas Rumanion : *Gradinitza-Rim*
- 12a : tagmanĝo
 - 14a : Jara Membro Kunveno (ĝenerala asembleo)
- de **Esperanto-France-Est**
- samtempe, turisma aranĝo por tiuj, kiuj deziras

Kolorado ĉeestos dum la tuta staĝo kun tipio kaj objektoj por prezenti al ni indianajn kutimojn (ĉefa temo por infanoj kaj gejunuloj → +arkpafado, ktp...).


Kursoj

- infana kaj adoleskanta kurso : Catherine GALLEGO
- kurso A (iniciantoj) : Ginette MARTIN
- kurso B (komencantoj) : Gérard GREINER
- kurso C (progresantoj) : André GROSSMANN

Prelegoj

Lydia BLOCH : Rumanio
Armand HUBERT : instruado

Vi ne forgesu viziti la libroservon



SOLIDARECO en NIA BUĜETO : plia PRAVIGO de EFest

Armand Hubert

Viroj kaj virinoj, de ĉiam, ne akceptis situaciojn kiujn cinika mondo altrudas al ĉiuj. Ili reagas kontraŭ subpremon, kontraŭ servuton. Ne nur politikan, financan kaj miserigan, sed ankaŭ kulturalan.

Je la komenco de la dudeka jarcento, oni kalkulis du centojn da Ne Registraraj Organizaĵoj. Fine de la jarcento, pli ol dek mil da ili.

Kontraŭ kreskantan maljustecon kaj perforton, la homoj mobiliziĝas. Diversmaniere.

Ni esploru tri aspektojn de solidareco laŭ la Universala Deklaracio de Homrajtoj (UDHR).

* Laŭ ARTIKOLO 25-a

La unua agadmaniero estu ilustrita de la Ruĝa Kruco, de Médecins Sans Frontières, Médecins du Monde, ... Jen junaj homoj, kiuj spite al danĝeroj kiuj minacas iliajn sanon kaj vivon, plenumas personan emon ŝanĝi la vivkondiĉojn de homoj senrimedaj kaj malsanaj.

Multnombraj aliaj kompatemaj societoj specife respondas al la artikolo 25-a de UDHR kiu pritraktas la rajton de ĉiu je sufiĉa manĝaĵo, je vesto, loĝejo, saniga prizorgo, ktp.

* Laŭ ARTIKOLOJ 5-a, 19-a, ...

La dua aspekto de solidareca emo estu ilustrita de Amnesty, ACAT, Ligue des droits de l'homme, ... Ilia agado aktivis el la foro ; iliaj membroj ne riskas sian vivon. Ili denuncas despotojn, perforton, nerespekton de homaj rajtoj. Ili admonas registarojn kaj organizas kontraŭstarojn.

La artikoloj de la UDHR kiuj mobilizas ilin estas la 5-a, kontraŭ kruda traktado de ĉiu homo ; la 19-a, favora al ĉies libera opinio ; la 10-a kiu rajtigas ĉiun esti juste juĝota ; la artikolo 2-a kiu defendas ĉies rajton je vivo, eĉ de kondamnito, ... (Tiu-ĉi lasta rajto estas plene agnoskata en la Eŭropa Unio).

* Laŭ ARTIKOLOJ 26-a.

Trian aspekton ja ilustras Esperanto (kaj Mondpaca movado, Mondcivitanoj, ...). Esperantistoj defendas kaj praktikas tion, kion la 26-a artikolo, (§ b) rekomendas : « ... kreskigi INTERKOMPRENIĜON, TOLEREMON kaj AMIKECON inter popoloj, inter etnaj kaj religiaj grupoj, ... por vivteni la pacon ».

Tie kuŝas NIA PRAVIGO surfone de la Universala Deklaracio.

UNESKO agnoskas tri esperantlingvajn asociojn, ĉar iliaj celoj kongruas multpunkte kun tiuj de la Institucio. Kiu estas tiu kongrueco ? UNESKO-a ĉefa tasko celas ampleksigi « solidarecon kiu implicas dialogon kaj respekton de aliulo ».

SOLIDARECO ENE de la MOVADO ?

Nu ! dialogon kaj respekton de aliulo ni spontane praktikas kaj elektis lernante la lingvon. Kio pri la solidareco en la Movado ? Esperantio urĝe bezonas ĉies apogon ne nur gazetartikole, sindoneme, sed ... mone.

EFest povas trovi kelkajn rimedojn en sia buĝeto.

Nia ĝisnuna financa politiko de dek jaroj pravus. Nia kaso helpis kaj subtenis multajn agadojn ene de la federacio kaj eĉ ekstere. Ŝparema sinteno donis al EFest fonduson kiun ni devas protekti kaj ampleksigi. Ĝi garantias nian eblon esti solidaraj ene de la Movado.

Ni adoptu buĝeton kiu enkalkulu pli solidarecan implicon favore al Esperantio. Kuna agado plej efikas kaj plie pravigos la ekziston de nia federacio.

DU PRELEGOJ ANONCITAJ :



KULTURA RENKONTO franc-rumania prezentota de s-ino Lydia Bloch, esperantistino loĝanta en Bar-le-Duc. De pluraj jaroj ŝi animas societeton RLM : Rencontre Lorraine-Roumanie.

Ĝus ŝi revenis el Rumanio kaj prezentos dum la staĝo interkulturajn elŝanĝojn de sia organizaĵo.

Celas la RLM-societo formadi instruistojn kaj vartistinojn kune kun Centro franc-rumania en Sighet. Ĝi celas ankaŭ « akompani » rumanajn infanojn dum du - tri jaroj kiam ilin endanĝerigas orfeco, en urbo Marameş. Kroma prizorgo en Gradinita.

RLM strebas formadi bonvolemluloj en la fakoj etinfaneco, profesia orientigo, biblioteko. Staĝoj okazis en Rumanio kaj en Francio (Bar-le-Duc) ek de 1996. Plia kunagado konkretiĝis en kreo de pedagogia revuo kaj interesigo al naturprotekto far de adoleskantoj per franc-rumanaj kunvenoj en Marameş kaj Bar-le-Duc.



SEMINARIO pri INSTRUADO

« PAROLIGA PARTO de KURSOJ » por komencantoj kaj progresantoj.

La kursoj enhavas pasivan kaj aktivan partojn. Pasivaj estas legado kaj aŭskultado, aktivaj, skribado kaj parolado : ĉiu leciono prezentu tiujn kvar aspektojn de la lernado.

La lernolibroj ne povas enteni sufiĉajn ekzercojn pri tiuj diversaj aspektoj. Alfalas al la instruanto kompletigi la uzatan metodon kaj emfazi pri iu aŭ alia aspekto.


La seminario en Hennezel, pritraktos paroligan parton de kursoj. Postulatas kunlaboro kaj kunludo, t.e. aktiva partopreno de almenaŭ ses personoj se temas pri kursosimiligado.

PROGRAMO :

Kiel animi paroligajn partojn de kurso per krom-ekzercoj ? Prezentiĝos skeĉetoj (4) sen ajna teksto ; dialogoj kun teksto (2) ; ludoj (3) : mebli aŭ vesti, serĉi la enhavon de bildo kiun oni ne vidas kaj ludo por memori la nombrojn. Gvidos Armand Hubert.

ALVOKO al la ĜENERALA ASEMBLEO, la 62 a !

Dimanĉon, la 13-an de aprilo 2003,
de la 14.00-a ĝis la 16.30-a h
HENNEZEL (88) en ECOLONIE



TAGORDO de la kunveno :

1/ -RAPORTO pri la SERVOJ de la asocio : ekspozici-materialo, Fontenoy-la-Joûte, « La Informilo », libroservo, perkoresponda kurso.

2/ - AGADA kaj FINANCA RAPORTOJ de la jaro 2002 : voĉdono.

3/ - BILANCO de dekjara agado de la Federacio.

Variado de la nombro de aliĝantoj al la Federacio, al La Informilo, al la PKK.
Variado de la financaj rezultoj por la Federacio, La Informilo, la libroservo.

4/ - BUĜETO 2003.

Nian ĝisnunan ŝparadon ni daŭrigu kaj dispartigu benefiton por subteni fidindajn celojn en la Movado.


Pridiskuto kaj voĉdono.

5/ - KOMITATANOJ : elekto/ reelekto

eksmandatiĝas : DEMONGEOT Claudy, LUDWIG Edmond, MASALA Bruno, DESBRIERES Emmanuel.

Demisias Alexandre KADAR, pro transloĝiĝo.

Restas du postenoj liberaj por pliaj estraranoj.




ĈU VI ESTAS KANDIDATO ? tiam anoncu vin !

KOMITATKUNSIDO.

La estraro de Esperanto France-Est kunsidos la 12-an de aprilo 2003 en ECOLONIE : HENNEZEL, de la 9-a ĝis la 12-a horo.

La ĉefaj punktoj pridiskutondaj estas difini buĝeton kiu respregulas efikan agadon favore al E-o, kontroli ĉu la lastaj decidoj plenumiĝis ; starigi novajn celojn por ampleksigi la Movadon.

La lasta kunsido en Nancy (20/ 10/ 2002) decidis pri kelkaj monhelpoj, pri financado de kultura parto de niaj kunvenoj, pri formado de instruantoj, pri organizo de ekzamenoj, ...



ESPERANTO FRANCE-EST

Estas printempa kunveno !

RAJTIGILO por la voĉdonado dum la 62-a Ĝenerala asembleo, la 13-an de aprilo 2003.

S-ro/ S-ino....., membro de Esperanto France-Est, rajtigas

S-ron/ S-inonvoĉdoni je lia/ ŝia nomo okaze de la Ĝenerala Asembleo.


dato : Subskribo :



Loĝado kaj manĝado en la kastelo

Notu ke eblas ankaŭ loĝi en diversaj lokaj hoteloj kaj eblas memzorgi pri manĝado (ni sendos al vi liston de hoteloj en la dua informilo).

Vi povos sportumi (tablo-teniso, flugpilkoj) kaj promeni en granda parko....



Rapide aliĝu ĉar ne estas multaj loĝeblecoj! Vi pagos surloke pri loĝado, vi antaŭpagu vian bazan kotizon (unua paĝo) kaj eventuale la pagon de manĝoj.

Por aliĝi pli rapide kaj tuj rezervi vian ĉambron aliĝu per interreto! www.esperanto-france.org

Loĝado en la kastelo:

Streku la noktojn:	Merkredon <input type="checkbox"/>	Ĵaŭdon <input type="checkbox"/>	Vendredon <input type="checkbox"/>	Sabaton <input type="checkbox"/>	Nb de noktoj Nb=
--------------------	------------------------------------	---------------------------------	------------------------------------	----------------------------------	------------------

Atentu: Streku ĉi-sube plurajn preferojn (almenaŭ 2 aŭ 3) kaj donu la vicon de prefero. Tiel, se via unua elekto ne plus estos ebla, ni provos kontingti vin per via dua aŭ tria elekto.

Streku viajn preferojn	Ununokta prezo	Vico de via prefero	Rezultota pago xNb
<input type="checkbox"/> En komuna dormejo	8 €	_____	_____ €
<input type="checkbox"/> En kvarlita ĉambro	10 €	_____	_____ €
<input type="checkbox"/> En trilita ĉambro	11 €	_____	_____ €
<input type="checkbox"/> En duilita ĉambro	12 €	_____	_____ €
<input type="checkbox"/> En unuilta ĉambro	16 €	_____	_____ €
<input type="checkbox"/> En la tendumejo (kunportu tendon)	4 €	_____	_____ €

Mi deziras loĝi kun _____

Mangado	Merkredon	Ĵaŭdon	Vendredon	Sabaton	Dimanĉon	Sumo
Matenmanĝo		4 € <input type="checkbox"/>	4 € <input type="checkbox"/>	4 € <input type="checkbox"/>	4 € <input type="checkbox"/>	_____ €
Tagmanĝo		11 € <input type="checkbox"/>	Tuttaga ekskurso <input type="checkbox"/>	11 € <input type="checkbox"/>	11 € <input type="checkbox"/>	_____ €
Vespermanĝo	5 € <input type="checkbox"/>	11 € <input type="checkbox"/>	11 € <input type="checkbox"/>	11 € <input type="checkbox"/>	11 € <input type="checkbox"/>	_____ €
Sumo por manĝoj:						_____ €

Ekzamenoj (estos organizitaj se sufiĉe da homoj kandidatas)

Ĉu vi deziras trapasi Esperanto-ekzamenon? ne jes se jes, kiu grado?: 1a 2a 3a

Mi intencas partopreni la tuttagan ekskurson en Angers jes ne

Pilaj aliĝiloj kaj informoj: www.esperanto-france.org 01 42 786 886 info@esperanto-france.org

LA GAZETO estas mondkultura revuo sendependa ne nur de politikaj, ŝtataj, religiaj kaj alitipaj organizaĵoj, sed ankaŭ de ĉiaj skoloj, grupoj kaj grupetoj naciaj aŭ internaciaj. Ĝia celo estas alporti al esperantlingvanoj kiel eble plej fidindajn informojn malpropagandajn pri ĉiuj fundamentaj aspektoj de civilizacioj, civilizoj kaj kulturoj estantaj kaj estintaj, kiuj iel gravas al la esperanta mondkoncepto.

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

LA GAZETO

MONDKULTURA SENDEPENDA ESPERANTISMA

PETU PROVNUMERON ĈE
LA GAZETO, 55210 CREUE, FRANCIO

lagazeto@osiek.org
<http://www.lagazeto.com>

INDIVIDUA ALIĜILO

(sendu la tutan ŝlipon)

Interasocia kongreso de UFE, JEFO, GEE, FET, FKEA

Kastelo Grezjiono / Château de Grésillon – Baugé
 en departemento Maine et Loire 40 km nord-oriente de Angers
Jauĉdon 29^{ma} de majo > Dimanĉon 1^{ma} de junio 2003

Ĉieliro-semajnfino / fin de semaine de l'Ascension

Temo - *Regionaj agadoj: ni interŝanĝu niajn spertojn!*

Turismo - *Malkovru la anĵuan regionon!* (provizora programo)

P	Prelegoj	Turismo	Vesperoj
R	Solidareco, prezento de	Piede vi vizitos la	Filmoj, diskoteko,
O	vojaĝo tra la monto de	kastelojn de Baugé,	teatraĵo(j), koncerto(j)
G	paro Rachel kaj David...	dolmenon, kaj aliajn	atendas vin...
R		proksimaĵojn	Kunveno
A	Laborgrupoj		Ĝenerala asembleo de
M	<i>Pi regionaj, interasociaj</i>	Tutaga ekskurso al	<i>Esperanto-France.</i>
O	<i>kaj diversfakaj agadoj...</i>	Angers vendredon	<i>Diversaj kunvenoj.</i>

Enlas alveni al la kastelo merkredon la 28-an de majo, ekde la 19-a. Pli detala kaj definitiva programo aperos en la revuo kaj en la TTT-ejo de Esperanto-France.

La aliĝo entenas: aliĝo al la kongreso, al ĉiuj laborgrupoj, prelegoj, koncerto(j) kaj al la interkonatiĝa buŝfido de jauĉdon vespere. Ĝi inkluzivas loĝadon kaj manĝadon, nur se elektitaj en la dua paĝo de tiu aliĝilo. Ĝi ne inkluzivas la tutigan ekskurson, pagotan surloke.

Pli da informoj ĉe la sidejo: 01 42 786 886 info@esperanto-france.org

Por aliĝi pli rapide kaj facile, aliĝu per interreto: www.esperanto-france.org

Por aliĝi per poŝto, plenu la ŝ-suban Individuan aliĝilon kaj sendu ĝin kun via pago per franca

ĉeko je nomo de Esperanto-France al: **Esperanto-France (Congrès 2003)**

4 his. rue de la Censale 75004 PARIS

Familia nomo: Persona nomo:

Adreso:

Poŝtkodo, urbo kaj lando:

Tel: Faksno:

Retadreso:

Sekso: ina malina Naskiĝdato: / / Vegetarian-in-o: ne jes

Mi membras en unu el la partoprenantaj asocioj: (nomo de la asocio)

Kotizo por membroj / ne membroj:

Plenkreskulo 40 / 50 € = € Mi veturos el (urbo)

Subtenanto 80 / 100 € = € kaj proponas loko(j)n en mia veturilo

Mi aliĝas post 30/04/2003 + 10 € = € Dato kaj horo de alveno:

Mi malpli ol 30 jaraĝas - 10 € = € kaj de foriro:

Jefo-anstudenulo/senlabora - 15 € = € **Dato kaj subskribo:**

Mi estas ekssterlandano senpage

+ manĝado (vudu en la dua paĝo): €

Sume: € (Via aliĝo validos post ricevo de via pago)

... al vojaĝemuloj kaj esperantofonoj nesatiĝeblaj ...

Vi ne povas ĉeesti la tradiciajn, jarajn, „oficialajn“ renkontojn kaj kongresojn, via feritempo aŭ libera tempo estas en oktobro, vi ŝatas ripozi sed ankaŭ multfacete kaj interesege esperantumi, kaj tio en kvazaŭ edena loko, proksime de bela maro, kiam ne plu svarmas la „somer-turistoj“... tiukaze, tiu informo estas por vi!

Partoprenu en la
„11a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo“
4-11 / 10 / 2003
en Santa Susanna (Barcelona) Katalunio, Hispanio
 (Hotelo MERCURY *** Avenida del Mar s/n.)

Korespondaj adresoj kaj informoj: Santiago Torné Graŭ, Tel: 037253421; Apartat 423, ES-08200
 SABADELL (Hispanio) aŭ Luis Serrano Pérez, Tel: 937275021; Faksilo 937314111 (ne dum aŭgusto)
 Rete: luis_serrano@mixmail.com

NI JA AĜADAS



SARREGUEMINES

Groupe Espéranto
Centre social
rue Roth
57200 Sarreguemines

CITOYENNETE EUROPEENNE et DROITS
LINGUISTIQUES en Saint-Avoid (57).

MESAĜO TRANSIRIS !

La 25-an de januaro okazis prelego pri eŭropa civitaneco kaj lingvaj rajtoj kun aldona parto pri planlingvoj kaj Esperanto, en MJC Saint-Avoid (57). Prelegis Armand Hubert antaŭ dek personoj.

Sekve de la prezento, Jacques Herlé havis interesajn elŝanĝojn pri Esperanto kun unu interesulino. Dankis la organizanto poste kaj skribis : « ... la ideo de lingvo kiu utilus kiel komunikilo kaj kiu respektas la kulturajn identecojn malkovrigis al mi novajn horizontojn. Mi baldaŭ intencas organizi debaton pri kultura imperialismo ... Mi petos pri via kontribuo... ». - La temo « lingvaj rajtoj » kongruos ! La mesaĝo transiris.

MANIFESTO 2000 en liceoj, Sarreguemines (57)

La dosiero « Cultivons la paix », eldonita de francaj esperanto-instruistoj, iĝis apogilo por prezenti la Manifeston 2000 de UNESCO en teknika liceo en Sarreguemines. Februare la 11, 18, 19 kaj 20-aj.

Tri instruistoj petis pri tia prezento kadre de eduko al civitaneco.

La prelego entenas tri partojn : aŭdvidon de kasedo pri perforto en la mondo, pripenson pri avantaĝoj de demokratio (ekzemple en Eŭropo), prezenton de la Manifesto 2000.

Civitaneco nepre inkluzivas dialogon kaj respekton de aliulo. Tia civitaneca klopodo en Eŭropo ankoraŭ ne ekzistas, (krom en esperanta medio).

Esperanto estis menciita sub la temo dialogo kaj toleremo. Stariĝis kelkaj demandoj pri la lingvo.



EPINAL

Amika rondo
Centre culturel
88 000 Epinal

Mikaelo Bronstejn en nia urbo... Unue mi dankas Ginette Martin, kiu zorgis pri la rilatoj kun la ĉefaj organizantoj de la turneo, kaj André Grossmann, kiu sendis diskon por la promocio. Tiu vizito de rusa kantisto estis okazo por konigi kulturon en esperanto ... tiamaniere ke iom post iom malaperu tiu gorda asertaĵo: „Esperanto estas senkultura lingvo“.

Ni do serĉis lokon, kie neesperantistoj estas. Hervé Morel kontaktis responsulon de kafejo, kiu organizis por ni la koncerton ĉe „Le Galion“, nova restoracio en Thaon-les-Vosges.

Cele promociion ni kontaktis la du ĵurnalojn de Epinal, ni redaktis artikolon (aperota en la urbestra bulteno), anonco ankaŭ aperis sur la elektronikaj paneloj. Distribuiĝis 50 afiŝoj (A3) kaj la familo Patron demetis 200 informfoliojn (A4) en butikoj. Dum 15 minutoj mi prezentis esperanton, ĝian kulturon... kaj la kantiston Mikael ĉe loka televida stacio, aŭskultigante evidente kanzonon de nia gasto.

Tiun muzikan vesperon ĉeestis 40 personoj, inter ili multaj neesperantistoj kaj la urbestro de Thaon. Okultrafa artikolo aperis poste en „L'Est Républicain“; la eventon aludis gelernantoj de mia mezlernejo. Du personoj decidis lerni la lingvon.

Emmanuel Desbrières

NB – Aktivis siaflanke en la grupo “*Les Amis de la Nature*”, Manette Bernardin, kiu partoprenis cetere en publika protest-marŝo en Epinal, kontraŭ eventuala konflikto en Irako. Ŝi svingis okultrafan panelon, kiu altiris la atenton de la loka gazet-raportisto... Tiu lasta ja ne nur aludis la “ĉeeston” de esperanto en la evento, tra la titolo de la raporto, sed ankaŭ fotis la ageman samideanon ! Ni instigas niajn francajn legantojn malkovri la aluditan raporton en ĉi tiu bulteno. Manette gvidos specifan kurson de esperanto, per la “*Freinet-metodo*”, en la esperanto-centro “*Kvinpetalo*”, de la 22a is la 26a de julio.


SAULXURES sur MOSELOTTE ————— ✪

La redaktanto de “La Informilo”

Grava evento estis la alveno de Mikael Bronstejn, kiu haltis ĉi tie dum sia franca turneo por regali nin multfacete (kanzonoj, gitaro, diapoj, „intervjuo“...). La vespero okazis en Basinroche, kvartalo de la vilaĝo, en la « *Maison Familiale Rurale* ». Grave kaj detale raportis L’E.R. (vidu la franclingvan artikolon sur alia paĝo).

Mi daŭre instruas al 9 gelernantoj (de la privata teknika lernejo) kaj unu adoltingo. Momente stabilas la lernantaro ! Mi daŭre laboras formike, nevideble... sed ĉiam plezure!

Ginette Martin



MULHOUSE

Mulhouse-Esperanto

Espace 110
avenue Rives de l'III
68 110 Illzach

En la tre riĉa inform-broŝuro de la kulturdomo *Espace 110* en Illzach, apud Mulhouse, estis anoncitaj la esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresantoj. Pri tiuj kursoj aperis ankaŭ komunikoj en la lokaj gazetoj fine de septembro kaj komence de oktobro.

Ekde oktobro 2002 povis tie ekfunkcii 2 vesperaj kursoj. Marde okazas la kurso por progresantoj kun 1 lernanto; estas uzata la libro „*Vojaĝo al Esperanto-landoj*“, kaj ĵaŭde la kurso por komencantoj kun 5 gelernantoj per „*Metodo 11*“, kaj okaze la video-kurso *Mazi en Gondolando*. Ambaŭ kursoj estas gvidataj de André Grossmann.

Espace 110 tiel metas je dispono de nia loka grupo salonon 2-foje semajne. Krom la vesperaj kursoj ankaŭ okazas tie niaj monataj kunvenoj.

Regule aperas Sud-Rejna Kuriero, la loka kaj translima bulteno de la grupoj de Mulhouse kaj Bazelo. Ĝi ankaŭ rezultas el la bona kunlaboro inter niaj du grupoj.

ESPACE 110 à ILLZACH

Esperanto

André GROSSMANN

Adultes,
Adolescents
(12 ans et +)

Langue de communication internationale,
plus facile à apprendre que les autres.
Une grammaire sans exception, sans
verbe irrégulier. De nombreux sites
Esperanto sur Internet pour apprendre et
s'informer.

Mardi : 18h30 à 20h00 Avancés

Jeudi : 18h30 à 20h00 Débutants

Début : Mardi 1 octobre à 18h30

Zamenhof-festo en Bazelo

La last-jara Zamenhof-festo estis organizita de la Bazela Grupo kaj okazis la 7an de decembro 2002. Ek de la 16a horo ni troviĝis en tre agrabla salono kun bele ornamitaj tabloj. Estis preskaŭ 50 partoprenantoj, kiuj venis ne nur el la proksimeco ĉirkaŭ Bazelo, Frajburgo kaj Mulhouse, sed ankaŭ el Strasburgo, el Zuriko ktp

Oni regalis nin per kafo aŭ teo kaj per mem-faritaj bongustaj kukoj. Plezuro ni retrovis malnovajn geamikojn kaj konatiĝis kun novaj vizaĝoj. Partoprenis pluraj simpatiaj gejunuloj.

S-ro Frank Ubik kaj lia filino prezentis per video-diapozitivoj sian Esperanto-vojaĝon tra Japanio, tre bone organizita de surlokaj gesamideanoj, kiuj sinsekve akceptis ilin en diversaj urboj, en siaj hejmoj kaj en grup-kunvenoj. Ni vidis belajn tradiciajn templojn, mirindajn tipajn japanajn pejzaĝojn kaj la entuziasman akceptadon de gesamideanoj ĉe bele ornamitaj tabloj. Frank ankaŭ montris al ni diversajn modernajn hejmajn instalaĵojn ankoraŭ ne-kutimajn al eŭropanoj.

Pasis la tempo, kaj en alia parto de la salono jam pretiĝis la manĝo-tabloj kun enmeze la rakledo-fornetoj. Bongusta fromaĝo, varmaj terpomoj kaj diversaj garnaĵoj. Post la vesper-manĝo ni ĝuis iom da violon-muziko kaj iun nekutiman danc-moviĝon far de kelkaj gejunuloj. Sed la gastoj ankoraŭ longe babilis antaŭ la disiĝo. Dankon al la organizantoj de la Bazela grupo. Zamenhof-feston por 2003 organizos la frajburga grupo (Germanio).



Zamenhof-festo en Bazelo


3-reĝa festo en Espace 110



Reĝino: Graĵina Ubik

La 9an de januaro 2003 refunkciis la vespera Esperanto-kurso por komencantoj en nia kulturdomo Espace 110. Tamen tiun unuan kurson en la jaro ni daŭrigis per festado de la 3 reĝoj. Venis ankaŭ aliaj membroj de nia grupo, kiuj tiel konatiĝis kun la novaj gelernantoj. Ni manĝis du specialajn migdal-pastajn kukojn, kiuj enhavis kaŝitan fabon (plasta figureto), kaj trinkis bongustajn Esperanto-vinojn. Ekestis reĝino kaj reĝo. Ni tostis je la gereĝoj kaj je la sukceso de Esperanto.

A. Grossmann



BAR-le-DUC

Espéranto-Meuse
185, rue du Veel
55 000 Bar-le-Duc

La klubo bedaŭras la foriron de unu el la fidelaj membroj... Suzanne Schertzer transloĝiĝis kaj elektis novan hejmon en Le Bourg d'Oisans cele alproksimiĝi je la du filinoj kaj nepino. Tamen ŝi regule sendas amikajn elektronikajn mesaĝojn. Neatendita vizito plezurigis kelkajn urbanojn: Tatjana Loskutova el Ivanovo (Rusio), post ĉeesto de la IF en Borken, gastis kelkajn tagojn ĉe sia franca korespondanto (ne esperanto-parolanto). Ŝi raportas plej interese en tiu bulteno

Inter la surlokaj eventoj: ŝia malkovro de la fajrobrigado!... Ŝi ja instruas la francan lingvon al la samaj profesiuloj en Ivanovo!


Trafis nin trista novaĵo: forpaso de la eta Laurine, el St-Dizier, kiu ofte partoprenis en niaj aranĝoj. La aparte tragikaj cirkonstancoj de ŝia malapero afliktis ĉiujn klubanojn.

Inter la projektoj survoje, ni notu fakan ekspozicion pri Esperanto okazonta jarfine en la *Centre Mondial de la Paix* en Verduno, sub la impulso de nia sekretario François-Xavier Gilbert kun la helpo de Armand Hubert el Sarreguemines.

Cetere Pol Denis raportis per fotoj pri sia vojaĝo en Ĉinio, kie li renkontis plurajn samideanojn.




SAINT-DIZIER



...“eta” Laurine forlasis nin... Ŝia daŭra rideto, ŝia gaja petolemo ĉarmis siajn parencojn, siajn junajn geamikojn... Nur naŭ jarojn aĝa, ŝi viktimiĝis je tragika akcidento, pri kio malfacilas raporti...

Ŝian patrinon, ŝian onklon, kiu plezure instruis al ŝi esperanton, ŝian tutan familion ni tutkore kondolencas...




Nepre atendinda !...



Post reveno el vojaĝo ĉirkaŭ la mondo (15-an de julio 2000 - 15-an de junio 2002), petveturile kaj per alia rimedoj, Rachel & David havas nun bildrakonton pri tiu vojaĝo por prezenti al vi. La diapozitivoj, kiuj rakontas ilian aventuron kaj precipe iliajn renkontojn, estas ordigitaj laŭtome tiel ke : la lernejoj, la religioj, la profesioj, ilia vivo de vojaĝantoj. . . kaj kompreneble Esperanto. Pri ĉi lasta temo, ili provas montri ke Esperanto estas vere ĉeestanta en la mondo kaj ke ĝi alportis multon al ili.

De retour d'un tour du monde (15 juillet 2000 - 15 juin 2002) en auto-stop et différents moyens de transports, Rachel & David ont maintenant un diaporama de leur voyage à vous présenter. Les diapositives relatent leurs aventures et notamment leurs rencontres et elles sont classées par thèmes tels les écoles, les religions, les métiers, leur vie de voyageurs. . . et bien sûr l'espéranto. Sur ce dernier thème, ils ont essayé de montrer que l'espéranto est vraiment présent dans le monde et qu'il leur a beaucoup apporté.

Rachel PRUAL & David CHOLET 34bis, rue du vieux bourg 85170 Dompierre/Yon tel: 02 51 07 56 88
<http://mondepouce.free.fr> e-mail : turistoj@hotmail.com



REAĜOJ



"reago" reago@yahooogroups.com De: "Claude PIRON" cpiron@bluewin.ch Date: Wed, 12 Feb 2003 11:41:05 +0100

Jen mia reago al *Pascale Clark* kaj *Castel-Bloom*, elsendo "Tamtam". (France Inter)

Madame, Voudriez-vous avoir l'amabilité de transmettre à Mme Orly Castel-Bloom le témoignage suivant?...

" ... Je participais à Tel-Aviv, fin juillet 2000, à un congrès qui se tenait en espéranto. Un participant japonais a tout à coup "perdu les pédales" et s'est mis à délirer. Son comportement agité ayant inquiété les personnes présentes, quelqu'un s'est souvenu que j'étais psychologue et est venu me chercher. C'est en lui parlant espéranto que j'ai pu calmer ce monsieur, qui ne savait que cette langue et le japonais.

J'ai pu le mettre dans un état d'hypnose légère pour approfondir le calme et lui fournir un début d'aide psychothérapeutique, toujours en espéranto. Il a ensuite été pris en charge par des psychiatres israéliens, qui ont pu lui administrer la médication indiquée, puis reconduit d'urgence au Japon où il a été hospitalisé.

Ayant vécu cette expérience, j'ai de la peine à croire mes oreilles quand j'entends dire que *l'espéranto ne fonctionne pas*. S'il est vrai que l'hébreu a un statut tout à fait différent, et que sa renaissance est une chose admirable, je le connais assez pour pouvoir dire que c'est une très belle langue littéraire. L'espéranto n'en est pas moins un facteur discret, mais non négligeable, de la vie internationale, et la production littéraire en espéranto vaut bien celle des autres langues dans le premier siècle de leur existence (voir www.esperanto-sat.info, cliquer sur "Documents").

Pour voir une chose dans le monde extérieur, il faut l'avoir vue d'abord dans le monde intérieur, m'a dit un jour un ami indien (et hindou). Est-ce la raison pour laquelle tant de gens ne voient pas l'espéranto? On ne perçoit pas une réalité si on est convaincu d'avance qu'elle n'existe pas.

Mais cela ne change rien aux faits. Le fait est qu'il y a des personnes qui parlent la langue de Zamenhof dans la plupart des villes de la plupart des pays. En fait, les locuteurs de l'espéranto sont plus nombreux dans le monde que ceux de l'hébreu, même si la quasi-totalité de la population l'ignore. Manifestement, des pans entiers de la vie sociale échappent à l'information. Il y a là un blocage psychologique collectif à ramifications sociales et politiques très intéressantes, dont j'ai traité dans mon livre *"Le défi des langues"*, L'Harmattan, 2e éd. 1998, si jamais la question vous intéresse. Quoi qu'il en soit, merci pour cette bonne interview!

Bien cordialement... "

Claude Piron, 22 rue de l'Etraz, CH-1196 Gland, Suisse

N.B. = La jena artikolo aperis en la *"Tribune de Genève"*, unu el la plej legataj gazetoj en la ĝeneva regiono (Svisio). la vendredon, 3-an de januaro 2003, sur la paĝo *"Dialogue"* en la rubriko *"L'invité"*. (*"La invitito"*, ĉi-kaze estis Claude PIRON). (La referencoj al TTT-hejmpaĝoj ne kuŝis en la artikolo).

LA ANGLA, UNUA LINGVO EN ORIENTA SVISLANDO: ĈU REALISMO, ĈU RAMPAMO?

N.B. = [ĉi-lasta vorto, estas slanga elpenaĝo de kanadaj franclingvanoj; ĝi estas tre malfacile tradukebla: *"rampismo"* aŭ *"adorkliniĝemo"* estus eblaj tradukoj. La plej laŭvorta esperantigo estus *"ventrokuŝemo"*, t. e. *"emo kuŝi surventre antaŭ iu potenculo"*. Kebekianoj nomas **à-plat-ventrisme** ("rampemo") la inklinojn ĉiam cedi al la angla lingvo.

Ĉu la decido de pluraj alemanaj [germansvisaj] kantonaj registaroj instrui la anglan kiel unuan fremdlingvon estas kazo de tia forĵeto de digno? Ni unue notu, ke la fascino, kiun kaŭzas la angla lingvo, kreas tunelan vidmanieron.

Hipnotigite per la malproksima lumeco, oni ĉesas vidi la tutan ĉirkaŭaĵon. Tiel la prezidanto de Nissan, sekve al la interkonsento kun Renault, devigas sian personaron studi la anglan *"por ke la laboruloj de ambaŭ firmaoj disponu komunan lingvon"* [Jomiuri Ŝimbun, 2002. 04. 17]. *"La Francoj ja scipovas la anglan same malbone kiel la Japanoj,"* li klarigis. *"Tamen, la angla estas nur kvazaŭ komputila programaro."* Fascinite de la angla, li blindas: kion valoras programaro, kiun oni ankoraŭ ne regas post ses jaroj? La fakton, ke la angla nun superregas, oni rigardas io definitiva. Kvazaŭ *"estas fakto"* signifus *"estas bone"*. Se tiu sinteno regus la historion, sklaveco plu daŭrus, kaj ne estus virino en la *Federacia Konsilantaro* [t. e. la tutsvisa registaro].

Estas pli demokratie starigi la demandon: "Kio konformas al ĉies intereso en la kampo de lingva komunikado?" Nu, komparante la diversajn rimedojn aplikatajn por superi la lingvajn barojn, oni malkovras "programaron" pli efikan ol la angla: **E-on**, kaj tia ĝi montriĝas, kiu ajn la kriterio: egaleco, flueco, precizeco, fonetika facileco, mallongeco de la lernado, ktp [Claude Piron, "Communication linguistique - Etude comparative faite sur le terrain" *Language Problems and Language Planning*, printempo 2002, vol. 26, n-ro 1, paĝoj 24-50 au www.esperanto-sat.info, alklaki *Dokumentoj*n, angla versio: www.geocities.com/cpiron/].

Efektive, mi parolis pli bone **E-on** post ses monatoj, ol la anglan post ses jaroj plenaj je sensecaĵoj, de la kvar malsamaj sonoj de *-ough* en *tough*, *though*, *through* kaj *cough* ĝis trompaj derivaĵoj kiel *hard* *hardly* (mi ĵus korektis la tekston de junulo, kiu volante diri "mi pene, streĉe laboris" skribis *I hardly worked*, kio signifas "mi apenau laboris").

Miaj kontaktoj ĉie en la mondo konfirmas, ke **E-o** estas pli bone adaptita ol la angla al internacia komunikado. Certe, jes ja, abundas tiuj, kiuj ĝin moke forĵetas, sed ili neniam observis kunsidon en **E-o**, vidis infanojn uzi ĝin ludante, foliumis tiulingvan magazinon, nek pridemandis personojn, kiuj praktikas kaj la ŝekspiran lingvon kaj la Zamenhofan. Tiuj uloj verŝajne misfamigas restoraciojn, kien ili neniam eniris, kaj veturilojn, kiujn ili neniam stiris. **Esperanto estas miskonata** [Ĝenerala informado: <http://www.esperanto.net/>].

Kiu scias, ke ĝi estas, post la angla, la lingvo plej uzata sur *Interreto*? [sincera mi estis skribante tion, ĉar mi vidis statistikon, kiu tion montris antaŭ deko da jaroj, sed ŝajnas, ke la situacio ŝanĝiĝis, kaj ke nun la japana, la korea, kaj ankaŭ aliaj lingvoj, antaŭas ĝin, simple ĉar pli da homoj el ĉiaj landoj povas konektiĝi al *Interreto* kaj komunikas inter si nacilingve]. Ke ĝi estas la lingvo de konsiderinda produktado literatura? Ke *Pekina* kaj *Varsovia* radioj elsendas en ĝi plurfoje ĉiutage, kaj *Vatikana* radio plurfoje ĉiusemajne [Radioprogramoj en Eo <http://members.aol.com/OSIEK/AERA/>]? Ke ĝi estas unu el la lingvoj de *Internacia Akademio de Sciencoj* [<http://www.ais-sanmarino.org/>]? Ke sep Nobelpremiitoj estis/as esperantistoj? Ke ĉiutage, ie en la mondo, ĝi estas la lingvo de staĝo, kultura renkontiĝo, kongreso [<http://perso.wanadoo.fr/esperanto/kalendar.htm>]? Ke troviĝas Eo-uzantoj en la plimulto el la urboj en la plimulto el la landoj, eĉ en *Soweto*, eĉ en *Lomé*, eĉ en *Ulan-Bator*? Ke ĝi stimulas la intereson al aliaj kulturoj kaj faciligas la akiron de aliaj lingvoj? Ke multaj junuloj uzas la reton de senpaga loĝigo organizita de Eo-asocioj [www.esperanto.nu/ps au www.esperanto.net/ps/]? Klare, ekzistas vastaj kampoj de la socia vivo, kiujn la informiloj tute pretervidas.

Ĉu havas sencon, ke franc- kaj germanlingvaj svioj interkomunikas en fuŝa angla post ses studjaroj, penante prononci sonojn, kiuj ekzistas nek en la franca nek en la germana (*th*, ktp), dum ili povus agrable dialogi en E-o post kelkaj monatoj? Se, ĉie, oni diskonigus la realon, nome, ke el ĉiuj rimedoj uzataj pro formoki Babelon, **E-o** estas tiu, kiu donas la plej bonajn rezultojn por la plej eta investo tempa, cerbostreĉa kaj mona [Claude Piron, *Le défi des langues* (Parizo: L'Harmattan, 2-a eld. 1998), ĉapitro 11], la lingva diverseco fariĝus tio, kio ĝi fundfunde estas: riĉo, ne malhelpilo.

Homo masohismas. Eble, por trovi nian sanan prudenton, ni bezonos, ke advokato lanĉu usonecan kolektivian plendon kontraŭ la ŝtatoj nome de ĉiuj, al kiuj ili trudis ŝviti super la angla, dum ekzistis rimedo pli demokratia, pli efika rilate al ĝia kosto, psikologie kaj kulture pli kontentiga, pri kiu ili neglektis informi sian civitanaron.

En tempo, kiam oni ofertas tiom da dungoj al t. n. raciecigo, la miliardoj, kiujn sorbas la instruo de la angla, kaj la miloj da horoj, kiujn milionoj da junuloj ĉie en la mondo dediĉas al ĝi kun priplorindaj rezultoj, estas nekontestebla malobeo al la admono racie agi. Se diri nenion pri la katastrofa kultura influo, kiun ĉie havas la disvastigo de la *broken English*.

Claude PIRON

(de Germain PIRLOT - gpirilot@esperanto.org)

... **Voyez ce que les institutions européennes destinent à nos langues nationales !...**

www.geocities.com/aaeesit/art22.html


extrait :

Dernières nouvelles du front de la traduction en Europe

Un article de Guylène Dhormes, membre AAE-ESIT

Traductions abusives

La Commission Européenne poursuit la France pour entrave à la libre circulation des personnes :Bruxelles reproche notamment à certaines préfectures françaises d'exiger une **traduction en français** des documents d'état-civil de personnes provenant d'un autre Etat membre de l'Union Européenne.





Le deuxième article de la **Déclaration Universelle des Droits de l'Homme** garantit à tous les citoyens du monde les mêmes droits **sans distinction de leur langue** de leur origine sociale, ou nationale. Cependant, pour les Nations Unies et organisations financées par l'organisation mondiale, tous n'ont pas les mêmes chances pour devenir des fonctionnaires mondiaux bien rémunérés. De plus en plus de postes, officiellement ouverts à tous les citoyens du monde, sont réservés non officiellement à **des locuteurs natifs anglophones**. Seuls ces hommes qui parlent l'anglais de par leur naissance, soit appartenant à des élites sociales, soit appartenant à des nations et pays anglophones, peuvent espérer des postes bien payés comme fonctionnaires des Nations Unies.

L'Union Européenne d'Espéranto, depuis déjà une année, informe les hommes politiques sur cette forme de discrimination à l'encontre des locuteurs non natifs anglophones. Des hommes politiques et des experts juristes sont du même avis que l'Union Européenne d'Espéranto : **exiger une connaissance native de l'anglais** pour un poste international officiellement ouvert à tous les citoyens du monde **est discriminatoire**. La suite de cette pratique discriminatoire est un besoin croissant de natifs anglophones. Il ne suffit pas que des hommes apprennent très bien l'anglais. Il ne suffit pas que toujours plus d'étudiants choisissent des universités britanniques, américaines et australiennes. Les organisations internationales ne veulent, de plus en plus, que des hommes qui maîtrisent parfaitement l'anglais comme langue maternelle.

L'espéranto est une langue de paix, d'égalité et de diversité. **Notre mouvement ne crée pas de discrimination** sur une base linguistique. Le système actuel de communication internationale établi sur l'usage principal ou exclusif de l'anglais **privilégie à vie certains hommes** mais exige des autres qu'ils investissent des années d'efforts pour atteindre un niveau moins élevé d'aptitude. Un tel système de communication est foncièrement antidémocratique. Une telle répartition de la puissance entre les langues est une recette pour une insécurité linguistique permanente ou une oppression linguistique directe pour une grande partie de la population mondiale.

Eksciindas ! . . . C'est bon à savoir ! . . .

Laù informo de Renato Corsetti, prezidanto de UEA, ĵus aperis nova libro de *Robert Philippon*, la aŭtoro de "*Linguistic Imperialism*", sub la titolo "*Engliŝ-Only Europe?*" (*Nuranglalingva Eŭropo* / 2003. Londono : Routledge, ISBN 0-415-28807-X).

Ĝi estas nun plia menciinda kaj konsilinda legaĵo, kiam ni rilatas kun la amasinformiloj kaj la politika mondo por atentigi pri la multflankaj minacoj, kiujn estigas la nur-angla kontraŭ egaleco kaj diverseco en Eŭropo: Tre belaspekta, ĝi enhavas kvar paĝojn pri Esperanto, kaj pliaj mencioj pri ĝi aperas sur sep pliaj paĝoj.

Robert Philippon esprimis la deziron, ke ĝi, same kiel "*Linguistic Imperialism*", aperu ankaŭ en la franca.

D'après une information de Renato Corsetti, président de l'UEA, un nouveau livre de *Robert Philippon*, l'auteur de "*Linguistic Imperialism*", vient juste de paraître sous le titre "*Engliŝ-Only Europe?*" (*L'Europe seulement en anglais* / 2003. Londres : Routledge, ISBN 0-415-28807-X). C'est une lecture qui vaut d'être mentionnée ou conseillée chaque fois que nous entrons en relation avec les médias ou le monde politique pour attirer l'attention sur les menaces de toutes sortes que fait peser le tout anglais contre l'égalité et la diversité en Europe.

Ce livre de bel aspect contient quatre pages sur l'espéranto qui est mentionné aussi sur sept autres pages.

Robert Philippon a exprimé le souhait que ce livre, de même que "*Linguistic Imperialism*", paraisse aussi en français.



La dua artikolo la **Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj** garantias al ĉiuj civitanoj de la mondo la samajn rajtoj senrigarde al sia gepatra lingvo, socia au nacia deveno. Tamen, por Uniĝintaj Nacioj, kaj organizoj financitaj per la tutmonda organizo, ne ĉiuj havas la samajn ŝancojn por fariĝi bone pagitaj tutmondaj funkciuloj. Pli kaj pli postenoj, oficiale malfermitaj al ĉiuj civitanoj de la mondo, estas neoficiale rezervataj al **denaskaj parolantoj de la angla**. Nur tiuj homoj kiuj denaske scipovas la angla, ĉu apartenaj al sociaj elitoj, ĉu apartenaj al anglalingvaj nacioj kaj landoj, povas esperi al bone pagitaj postenoj kiel funkciuloj de Uniĝintaj Nacioj.

Eŭropa Esperanto-Unio, ekde jam unu jaro, informas politikistojn pri ĉi tiu formo de diskriminacio kontraŭ nedenskaj parolantoj de la angla. Eŭropaj politikistoj kaj juraj spertuloj samopiniis kun Eŭropa Esperanto-Unio: **postuli denaskan scipovon de la angla** por internacia posteno, oficiale malfermita al ĉiuj civitanoj de la mondo, **estas diskriminacia**. Sekvo de tia diskriminacia praktiko estas kreskanta bezono de denaskaj parolantoj de la angla. Ne sufiĉas ke homoj ege bone lernas la anglan. Ne sufiĉas ke ĉiam pli da studentoj elektas britajn, usonajn kaj aŭstraliajn universitatojn. Internaciaj organizoj pli kaj pli nur volas homojn, kiuj perfekte regas la anglan kiel denaskan lingvon.

Esperanto estas lingvo de paco, egaleco kaj diverseco. **Nia movado ne diskriminacias** sur bazo de lingvo. La nuna internacia komunikistemo, bazita sur la ĉefa au nura uzado de la angla lingvo, tutvive privilegias iujn homojn, sed postulas de aliaj, ke ili investu jarojn da penoj por atingi malpli altan gradon de kapablo. Tia komunikistemo estas fundamente maldemokratia. Tia malegala disdivido de potenco inter la lingvoj estas recepto por konstanta lingva malsekureco, au rekta lingva subpremado ĉe granda parto de la monda loĝantaro.



Detlef Karthaus (Kanado), kiu sendis dankmesaĝon al la germana radio "Deutsche Welle" sekve de disaŭdigo de Esperanto-kanzono, ricevis jenan respondon :

"Bonan Tagon, multan dankon por via retpoŝto. Ni disaŭdigis je la 11-a de januaro 2003, kanzonon en Esperanto. Ni volonte akceptas viajn muzikpetojn, kiujn ni volonte plenumos laŭ ebleco Bondezirojn.

Judith Gerlach, germana programo

Tio signifas, ke radiostacioj, kiuj kutime disaŭdigas kanzonojn laŭ peto, eble volonte farus tion ankaŭ por Esperanto-kanzonoj. Tio ebligus iom post ioman al kutimiĝon al la ideo, ke ekzistas aliaj lingvoj ol la angla por la kantado.

Detlef Karthaus (Canada), qui a adressé un message de remerciements à la radio allemande "Deutsche Welle" suite à la diffusion d'une chanson en espéranto, a reçu la réponse suivante :

Bonjour,

Merci beaucoup pour votre courriel. Nous avons diffusé une chanson en espéranto le 11 janvier 2003. Nous acceptons volontiers vos musiques à la demande que nous honorerons autant qu'il se peut.

Avec nos vœux,

Judith Gerlach, programme allemand

Cela signifie que des stations radio qui diffusent d'habitude des chansons à la demande le feraient peut-être volontiers aussi pour des chansons en espéranto. Cela permettrait peu à peu d'accoutumer à l'idée qu'il existe d'autres langues que l'anglais pour la chanson.

Floreal Martorell, direktoro de la muzika eldonejo "Vinilkosmo" <http://www.vinilkosmo.com> ĝuste atentigis pri ĵusa apero de nova artisto en la Esperanto-muzika mondo : Daphne Laŭles (Dafne Laŭles) :

"Artistino el Wellington en Novzelando, kiu faras elektronikan popmuzikon. Daphne (Daph por la intimuloj) havas jam sufiĉe interesan kaj longan muzikan sperton en diversaj bandoj en Wellington.

Ŝi komencis solistan karieron antaŭ 3 jaroj kaj ŝi eldonis du diskojn, *Facing images* (2000/01) kaj *Undinal songs* (2002) (*Undinaj kantoj*).

Ŝia dua disko enhavas du Esperanto-kantojn: "La sorĉistino" kaj "Hejmen mi flugus".

Ceteraj kantoj estas en la angla. Kaj bonega novaĵo : Daphne ne kantas papage ! Ŝi lernis/as esperanton kaj havas tre bonan prononcon. . .

Laŭdinda ekzemplo !"

Estas eble viziti ŝian retpaĝaron (en esperanto bonvolu !) kaj eĉ auskulti kaj mendi la diskojn : <http://www.randomstatic.net/laŭless/eo/index.html>

Directeur des éditions musicales "Vinilkosmo" <<http://www.vinilkosmo.com>, Floreal Martorell vient justement de signaler l'apparition d'une nouvelle artiste dans le monde de la musique en espéranto : Daphne Laŭless :

"Artiste de Wellington, en Nouvelle-Zélande, qui fait de la musique pop électronique. Daphne (Daph pour les intimes) a déjà une longue et intéressante expérience musicale dans diverses bandes à Wellington.

Elle a commencé une carrière comme soliste voici 3 ans et elle a édité deux disques, *Facing images* (2000/01) kaj *Undinal songs* (2002).

Son second disque contient deux chansons en espéranto : "La sorĉistino" kaj "Hejmen mi flugus". Les autres chansons sont en anglais.

Et une bonne nouvelle : Daphne ne chante pas comme un perroquet ! Elle a appris et apprend l'espéranto et elle a une très bonne prononciation. . .

Exemple digne d'éloges !"

Il est possible de visiter ses pages web (en espéranto SVP !) et même d'écouter et d'acheter ses disques : <http://www.randomstatic.net/laŭless/eo/index.html>

Arno Lagrange informas, ke li pliboniĝis la tt-paĝojn, kiujn li kreis pri Esperanto en Senaglio : <<http://perso.wanadoo.fr/kultur.art.festival.eo/Senegal/Eo/EsperantoSn.htm>. Estas konstateble ke Esperanto notinde progresas sur la afrika kontinento malgrau cirkonstancoj ofte tre malfavoraj : vd ankaŭ <<http://dmoz.org/World/Esperanto/Regiona/Afriko/>

Arno Lagrange informe qu'il a amélioré les page web qu'il avait créées sur l'espéranto au Sénégal : <<http://perso.wanadoo.fr/kultur.art.festival.eo/Senegal/Eo/EsperantoSn.htm>. Il peut être constaté que l'espéranto fait de notables progrès sur le continent africain malgré des circonstances souvent très défavorables : voir aussi <<http://dmoz.org/World/Esperanto/Regiona/Afriko/>



*Emfazu pri nia propra kulturo!
Inter diversaj rimedoj, montru al la skeptikuloj
la novan libron, kiun vi metis sur vian libro-bretou!*

El nia libroservo

Informoj



⇒ La libroservo partoprenos la 53an staĝon en Hennezel, la 12an kaj 13an de aprilo .

⇒ La nova retadreso de la libroservo estas : libroservo.efe@wanadoo.fr



Resumoj, recenzoj, opinioj...

⇒ Ĉiu leginto kiu deziras recenzi, preparoli, opinii pri legita libro povas sendi al mi (je la adreso de la libroservo) kelklinian tekston por ke ĝi aperu en tiu rubriko en venonta informilo.

Recenzo **Cecilja** (Felix TIMMERMANS) – tri poetaj romanetoj



Eble vi iam konatiĝis kun la Svedo Stellan ENGHOLM, kies rakontoj naturproksimaj kaj homamaj ravas pro sia simpleco kaj senta profundeco.

Se liaj rakontoj ravis vin, vi certe ankaŭ ĝuos plej profunde la tradukon de tri romanetoj de la Flandro Feliĉ TIMMERMANS. Tuj post eklego vi enkorpigo en la diversajn figurojn, vi kunsuferos kaj ankaŭ kunfeliĉos, je intenso des pli ega, ke la antagonismaj sentoj profundas.

Kiom dolorigas la sopirego de *Cecilja*! Kaj la begineto *Simforoza* trovas ampleajn horojn malgraŭ finfina rezigno.

En *Kristnaska Triptiko* temas pri la tri reĝoj, sed Kristnasko ne rutinos por la iama paŝtisto *Suskewiet*, la angilkaptisto *Pitjevogel* kaj la almozulo *Schrobberbeeck*.

Jesja, rave belaj rakontoj!

Por mendi librojn:

1. Vi sendas vian mendon

- per poŝte (la plej sekure) al : Libroservo 7 place de PARIS 54500 VANDOEUVRE (uzante la dorsflankan medilon)

- per e-poŝto al «libroservo.efe@wanadoo.fr»

- nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.

2. Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)

3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «libroservo 2800-76 H NANCY» (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libroservo» sendita al la adreso de la libroservo.

Germananoj povas pagi per germana poŝta ĝiro al la poŝta konto de TAKE (POSTBANK 3393 48-758 BLZ 660 100 75), indikante: «libroservo + numero de fakturo»





Jus naskito:

Ĉar la cikonoj feris dum lasta vintro, alvenis nur unu!

- la **kalendaro** - tra la tempo - tra la spaco - historio - 206p - **Cherpillod** - *La Blanchetière*... 15,00 € . promonado tra la tagoj, semajnoj, monatoj kaj jarojn de la Egiptoj, Judoj, Romianoj, Araboj, Persoj, Aztekoj...



...Kelkaj statistikoj pri nia libroservo...

En 2002, la libroservo aĉetis 649 librojn (113 titoloj - inter ili 21 nove eldonitaj).

260 libroj vendiĝis (135 diversaj titoloj).

Komence de 2003 la libroservo enhavas 2774 librojn (556 titoloj)

Jen la plej bone venditaj libroj:

- 25 Dictionnaire de poche esp-fr / fr-esp - 132 p -SAT- 4,30 €
- 13 Metodo 11 - 82p UFE- instrulibro -5,50 €
- 9 Baza esperanta radikaro 162p - UEA - vortareto - 7,50 €
- 8 Avo fungo kaj aliaj rakontoj 34p - Claudel - noveloj- 4,60 €
- 8 In-Spir (kasedo) Bonin - 18,30 €
- 8 Metodo 15 - 30p - UFE - instrulibro - 3,05 €
- 8 Vojaĝo en esperanto-lando - 280p - Kolker - instrulibro - 18,00 €
- 7 Nouveau cours d'esperanto - 196p - Ludwig / Triolle - instrulibro - 10,80 €
- 6 Nigra insulo (la)- 62p - Hergé - bildstrio - 10,20 €
- 5 Duone (kasedo) Faverial - 15,00 €
- 5 Plena ilustrita vortaro (la nova) - 1272p - SAT - vortaro - 70,00 €
- 4 Lasu min paroli plu - 130p - Piron - romano - 9,00 €
- 4 Paŝoj al plena posedo - 240p - Aùld - instrulibro -12,00 €
- 4 Gerda malaperis - 58p -Piron - romano - 3,90 €
- 4 Dankon amiko! - 42p -Piron - romano - 3,90 €
- 4 Libro de la mirindaĵoj - 450p - Marko Polo - Historio - 33,00 €
- 3 Junulkurso kun suplemento - 98p -SAT - instrulibro - 7,50 €
- 3 Kisa malsano (la) - 122p - Bako - romano - 4,20 €
- 3 Dictionnaire pratique fr-esperanto / esp- fr - 532p - Andrieu -vortaro - 23,00 €
- 3 Anaseto kaj koketo -32p - Hùang Ĝjunuan - infanlibro - 2,00 €
- 3 Feliĉa birdo (la) -52p - Opo - infanlibro - 2,00 €
- 3 Fiera multkolora kateto (la) -44p - Ĝeng Ĝeng - infanlibro - 2,00 €
- 3 Kosmo kaj ni (la) - 202p - Galadi - Enriquez - sciencolibro -18,00 €



MENDILO

Bonvolu sendi tiujn librojn:

al jena adreso:

S-ro/ino

-
-
-
-
-

En

la

Subskribo:



MI RAPORTAS

Ribovino, fajrobrigado... kaj esperanto!

... aù etaj vintraj travivaĵoj de Tatjana en Francio ...


La vizitoj al Francio jam delonge por mi ne estas unikaĵo: la kolegoj ŝercas, ke mi veturas eksterlanden, kvazaŭ al la bieno apudurba. Eble, ili iom pravas: kompare kun aliaj “ordinaraj” nialandaj civitanoj mi vojaĝas relative ofte (1-2 fojojn jare). Kaj tio estas *n o r m a l a* por “neordinaraj” civitanoj, civitanoj de Esperantujo. Nia amata lando etendiĝis sur la tuta terglobo. Ĝi allogas ĉiam kaj en ĉiuj sezonoj.

Kaj jen, ĉi-foje – vintre, mi vizitis La *Internacian Festivalon (IF-o - fama E-aranĝo en Germanio)*, kiu gastigis pli ol 200 personojn el 24 landoj de la mondo. La IF-o finiĝis kaj preskaŭ ĉiuj ĝiaj partoprenantoj forveturis hejmen, sed kelkaj profitante la okazon daŭrigis akumuli siajn impresojn. Ankaŭ mi ne preterlasis la eblecon vojaĝi. Mia celo estis Francio, la dolca Franclando, kiun mi ŝatas de multaj jaroj kaj ĉiam strebas viziti ĝiajn diversajn angulojn.

La unuan fojon mi vizitis Francion antaŭ pli ol 10 jaroj pro la mirinda kastelo “*Grésillon*”. Tuin-ĉi E-centron de franclanda esperantistaro konas multaj samideanoj en la tuta mondo kaj revas almenaŭ unufojon veni al ĉi jam 50¹-jaraĝa unika Kulturdomo. Ĉu vi ankoraŭ ne vidis ĝin? Ne sekvis ĝiajn diversgradajn kaj diverstemajn kursojn? Ne sidis kun geamikoj ĝis malfrua vespero en la kafejo parolante serioze, babilante pri nenio, ridante ĝislarmede? Ne promenis tra la vasta parko? Ne vizitis la famajn kastelojn de Luaro? Se vi venos al Grésillon, ĝi restos por ĉiam en via koro! Sed vintre la kastelo estas fermita. Kaj mi kun plezuro vizitas alian regionon.

Do, mi venis al orienta parto de la lando. La unuan fojon mi venas al Francio vintre. Kia ĝi estas vintre, Francio? Kie estas neĝo vintra? Tute forestas, ĉie grizas la nuda trotuaro kaj asfalto. Kion surmetas Francoj vintre? Strange, multaj estas senĉape kaj en aŭtunaj (printempaj) vestaĵoj! Ankaŭ ŝuoj ne estas solidaj por vintro! Malgranda frosto (nur -5) timigas ilin: pro glita aŭtovojo veturi peraŭte estas danĝere! Kaj en Rusio tiutage estis inter -25 kaj -30... Kion manĝas Francoj vintre? Fruktoj kaj legomoj same, kiel somere, abundas en vendejoj. Ĉu estas varme en hejmoj? +18 + 20! En mia hejmo estis en komenco de januaro (kaj pliposte ankaŭ) -12 (la filino diris telefone). Komparoj, surprizoj... Mia ĉeesto en la regiono estis relative “trankvila”, ĉar mi vere preferis iom ripozi post tre viglaj novjaraj festotagoj dum la IF-o. Allogis ankaŭ min ebleco iom praktiki la francan lingvon (mia gastiganto ne estis esperantisto).

Tamen, la esperantista animo ne eltenis la tenton konatiĝi kun loka esperantistaro. Do, en la urbodomo de Bar le Duc ni informiĝis pri la adreso de s-ro *Pierre Canus*, prezidanto de loka E-klubo. Telefonis al li. Ricevis inviton tuj veni. Vera balzamo – esperantlingva problemoj de niaj kluboj, pri la *Tutmonda* ktp. Al nia kompanio aliĝis la edzino de sed pro la diversaj kaŭzoj ne povis ĝin vidis unu la alian la unuan fojon! Unika kaj tuj. Gastamaj mastroj ne preterlasis la beroj de sia ĝardeno. Memoro pri ĝia



Fine de nia restado ĉe bonkora paro, sur la sojlo, aperis nova vizaĝo: tiel mi konatiĝis kun *Pol Denis*. La lasta volonte konsentis pri la kontakton kun loka (ĉirkaŭ 300 km nordoriente de Moskvo), kie mi estontaj oficiroj - fajrobrigadistojn. La sekvan de Bar le Duc. La vizito estis por mi speciale por poste rakonti al miaj gekolegoj kaj miaj instalaĵoj, aŭtoj, laborkondiĉoj kaj vestaĵoj de donacis al mi kelkajn numerojn de revuo “*Le studentojn* pri la vivo de francaj komparoj, surprizoj... Interesa kaj utila por mi



Ĉu povus mi sen helpo de esperantistoj okazigi tiun-ĉi viziton tiom bezonatan por mia profesia laboro? Apenaŭ tio eblus! Kaj poste ankoraŭ estis vigla konversacio en komforta kafejo: nemulta publika kaj taso kun varma ĉokolado disponis al seninterrompa diskuto – mi ĝuis la lingvoscion de Pol, lian bonhumoron kaj bonhumuron, lian entuziasmon pri Esperanto-agado, lian neelĉerpeblan energion. Rapide pasis neplena semajno: tempis reveni hejmen. Tra preskaŭ tuta Eŭropo trajne mi veturis ĉirkaŭ 3000 kilometrojn preskaŭ 3 diurnojn. Sed tio estas *n o r m a l a* por “neordinara” persono, des pli se li (ĉi-kaze – ŝi) estas esperantist(in)o!

Tatjana Loskutova, Rusio (Ivanovo)

... neforgesebla itinero tra ĈINIO !...

(sekvo: vidu "La Informilo"-n 120)



la raportinto en salono de la universitato de Nankin

Komforta buso alvenigas nin en **Wuhan**, kie inaŭguriĝis en 1957 la unua ponto sur la Yang-Tse. Tradicias indaj vizitoj de urbaj muzeoj... En ĉi tiu mirigas nin inter aliaj malkovroj la eksterordinara kariljono el bronzo! „Ĉerizo sur la kuko“: ni ĝuos originalan koncerton de ĝia „klono“, ludata de belaj muzikistinoj vestitaj je bunta kostumo. Memevidente, ankaŭ tradicie, ĉiuj turistoj eniras ian faman budaan monasteron, kie ni ekscios ĉion pri la vivo de la loĝantaro... Meritas apartan foton la salono kun la 500 orumitaj „arhatoj“.

Post unuhora flugo, jen la urbego **Nanĵing** (Nankin), kie tute neatendite akceptis nin ĝoje en la halo de la hotelo la familio Zhuang Qixiong -fileto Rui kaj gepatroj... Kiam la knabo salutis nin per kanto en perfekta esperanto, la ceteraj kunvojaĝantoj okulumis al ni envie... *sed, sed ili uzas esperanton?!?! Ĉu mi aldonu, ke ĝis nun preskaŭ ĉiuj skeptike kondukis, kiam ni fojfoje aludis nian esperantistecon... Dua surprizo: post telefonvoko invitas nin, cele prelegeton en la urba universitato, samideanino Cui Jianhua, kiu profesie instruas la francan lingvon kaj esperanton! Konfeseme dirite, tio incitos nin la tutan tagon dum la planitaj diurnaj vizitoj... Kvazaŭ sporta evento la suprenirado de la 3192 ŝtupoj por atingi la maŭzoleon de Sun-Yatsen!... Sekvos busveturado ĝis la astronomia observatorio kun specifaj instrumentoj, kiuj datumas el la 15a jarcento! Ekzotika promeno posttagmeza tra la fama „birdo-bazaro“... Kaj jen la sopirata renkonto en salono de la universitato... Dum pli du horoj disvolviĝos intensa babilado kun gestudentoj, kies scivolemo riveliĝos nesatigebla... Mirigos nin la nokta rehejmiĝo de Cui... biciklede!*

La morgaŭon, ŝi akompanos nin ĝis la stacidomo... Varma adiaŭo, kisoj... kaj promeso de futuraj renkontoj! Ĉifoje konfesas unu el la kunvojaĝantoj, „*Jes, mi propraokule kaj propraorele konstatas, ke esperanto ne estas utopio!...*“.

Nu, ni malkovros la etoson de la ĉina trajno, kiu veturigos nin ĝis **Suzhou**. „*Plej valoras frande manĝi en Kantono, forpasi en Liuzhou... kaj ami en Suzhou*“ asertas malnova proverbo. Fakte jen la urbo kun 150 „parkmultnombraj lagetoj, sur kiuj kiujn ni atingas per zigzagantaj eta motor-ŝonko) sur la kanaletoj, riĉecon kaj mizeron de la apuda post kelkaj jardekoj? Aldoniĝos vizito de la taga plenaera nutrajnedifinan miksaĵon da odoroj (fiŝoj, kaj korpaj emanajoj!). Abundas tie estaĵoj, kiujn oni malfacile taksas la vere interesoplenan malkovron de tradicia silko-ŝpino, mi diru de A ĝis Z, t.e. depost la pritraktado de la kokono -ĉu vi scias, ke ie oni taksas la internan besteton manĝebla!- ĝis la magazeno, kie oni proponas al ni mirindajn silk-produktojn laŭ ege moderaj prezoj!



la vere interesoplenan malkovron de tradicia silko-ŝpino, mi diru de A ĝis Z, t.e. depost la pritraktado de la kokono -ĉu vi scias, ke ie oni taksas la internan besteton manĝebla!- ĝis la magazeno, kie oni proponas al ni mirindajn silk-produktojn laŭ ege moderaj prezoj!

Sed jen la momento denove entrainiĝi por veturi al **Shanghai**... Tri kvaronoj sufiĉos.

P. DENIS

(sekvota): ... *Shanghai... Guilin... Kantono... Hong-Kong...* se mia "raporto" ne tro tedis vin ĝis nun!

IF

INTERNACIA
FESTIVALO

LA 19-a INTERNACIA FESTIVALO BORKEN 27.12.2002 - 3.1. 2003 RELIGIOJ KAJ KONFLIKTOJ

Jen la ĉarma kastelo apud Borken, kie okazis la 19a Internacia Festivalo, la plej grava kaj alloga jarfina Esperanto-aranĝo. En tiu mirinda kadro pli ol 200 personoj kune feris de la 27a de decembro 2002 ĝis la 3a de januaro 2003.

Refoje la organizanto Hans-Dieter Platz sukcesis krei la IF-miraklon, li sukcesis krei la necesajn etoson kaj programon, por ke la partoprenantoj povu travivi eksterordinaran, kulturriĉan kaj distran, internacian semajnon transire al la nova jaro 2003.

Interne de la kastelo troviĝas vastaj salonoj, kie okazis la diversaj prelegoj de varia kaj riĉa programo. La kadra temo estis "Religioj kaj konfliktoj". Interesaj prelegoj pritraktis tiun temon kaj montris la gravajn influojn de religioj al la kutulro kaj al la socio, kreante tradiciojn kaj kutimojn de unuopaj popoloj. La programo ofte proponis samtempe 5 ĝis 6 programerojn inter, kiuj ja necesis elekti. Okazis diversaj gimnastikoj, danco-kursoj, instruado pri origamio, ĉina kaligrafio, tradicia pentroarto, ktp.

Aparte kaptis la atenton de aŭskultantoj prelegoj pri la uzado de interreto. "Kiel protekti sin kontraŭ komputilaj virusoj" kaj "Kiel protekti sin kontraŭ spamoj (amasreklamado)".

Ĉiu-posttagmeze okazis gviditaj promedadoj al la urboj Borken, Gemen kaj ĉirkaŭaĵoj. Sed bedaŭrinde plej ofte ankaŭ la pluvo kune rendevuis.




En Borken, jen interesa monumento, la erinaco



La akvokastelo Gemen, de 13a jarcento, estas elstara konstruaĵo en Borken, en la regiono ĉefe konata kiel "Jugendburg Gemen" (Junularkastelo Gemen). Gemen estis memstara urbo ĝis la 19-a jarcento, nun urba parto de Borken. Borken (kun ĉiuj urbopartoj) nuntempe havas 40.000 enloĝantojn.

La Knajpo estas la IF-kafejo, kie oni renkontiĝas dum la paŭzoj, post la manĝoj, post la vesperaj programoj, por kafumi, teumi, bierumo... Ĝi estas tre grava loka dum la tuta IF-semajno. Tie eblas konatiĝi kun novaj partoprenantoj, babili, ludi. Kompetentaj helpantoj deĵoras por servi la klientojn.



Ekestas amikaj rondoj por kune babili en bona humoro kaj gaja etoso, ofte ĝis ege malfrue matene. Kreiĝis ankaŭ tie pluraj lud-rondoj kun ofte tre interesaj ludoj. Facile eblas aliĝi al tiaj rondoj kaj konatiĝi kun novaj ludoj kaj ludantoj. La knajpo proponas diversajn trinkaĵojn tute en Esperanto. Certe eblas trovi diversajn bierojn germanajn kaj belgajn, sed ankaŭ koktelojn kun Esperanto-nomo, kiel "ruĝulino", "verdolino", "virgulino" ktp. Bele prezentita broŝuro estas je dispono de la klientoj. Krome vendiĝas ankaŭ tie la famaj Esperanto-vinoj de Anton Kieffer.

Jen la ludo "Blokus"



La tut-taga ekskurso arigis 3 aŭtobusojn da ekskursantoj. En la urbo Xanten ni vizitis imponajn romiajn restaĵojn. En la romia epoko ĝi estis grava urbo, la plej norda "colonia" de la imperio. Malgraŭ kelkaj sunradioj, post la vizito al tiu templo, nin daŭre akompanis la pluvo. Iom longe daŭris la tagmanĝo en la restoracio kun nomo "Gotisches Haus", malfru-gotika domo. Ni tamen sukcesis viziti la pilgrimejon Kevelaer sub daŭra pluvo. Pro malfavora vetero kaj malfruo ni ne veturis al Nerderland, kiel unue planite. Ni revenis al "nia" kastelo.



La distraj vesperoj ebligis ĝui diversajn koncertojn. Sin prezentis loka folkloro danc-grupo de Gemen, la fama "Kajto" el Nederlando, la profesia komponistino Elena Puñova el Ĉeĥio, la humora kantisto Mikaelo Bronŝtejn el Tiĥvin en Rusio, la hispana teknomuzikisto Solotronik. Apartan sukceson havis la kant-grupo "Kajto" kun siaj ĉarmaj kantoj eĉ se iom naivaj sed tre klaraj kaj kompreneblaj tekstoj.

Por kunkantigi la publikon ili montris la tekstojn sur grandaj afiŝoj sur la scenejo.

Fervora publiko dum koncertoj



Kajto produktis jam 4 kompakt-diskojn. Dum la koncerto ili kantis novajn kantojn. Eble baldaŭ



aperos nova KD. La publiko ĉiam entuziasme partoprenis tian vesperojn. Kiel tradicie, la lasta vespero estis la internacia vespero kun kontribuoj de la IF-anoj. Tute alian impreson donis Eduardo Vargas el Hispanio, kiam li prezentis modernan teknomuziko kun diversaj

lum- kaj son efektoj. Kun impona voĉo li admirinde kantis la Esperanto-himnon. "La eta Princo" ricevis plaĉan prezentadon fare de Elena Puñova kunlabore kun Mikaelo Bronŝtejn.

Inter la danc-kursoj ricevis apartan atenton la kurso kaj ekzercoj pri polonezo. Pli ol 20 paroj ekzercis tiun paradan dancon kun la celo ĝin prezenti antaŭ la malfermo de la silvestra danc-vespero.

Por la 31a de decembro la kavalira salono estis la tre oportuna manĝejo kaj dancejo. Tre bela bufedo estis je dispono en apuda salono. La organizanto laŭvice vokis laŭ tabloj la gastojn, kiuj povis sin servi ĉe la bufedo. Ja ne estus loko por ĉiuj homoj samtempe. Je la 21a horo post la fino de la manĝo kaj antaŭ la komenciĝo de la balo, ekaŭdiĝis la muziko de polonezo kaj ni parade eniris la salonon laŭ la bela ritmo de tiu muziko. Ĝi estis ege sukcesa kaj la ceteraj gastoj multe aplaŭdis nin, eble eĉ kun bedaŭro, ke ĝi ne daŭris pli longe. Supozeble tiu ideo estis ege bona kaj restos aŭ evoluos por venontaj IF.

Poste okazis la silvestra balo en la kavalira salono. La muziko invitis al dancado. Tamen tre baldaŭ bele dancebla muziko pli kaj pli maloftis. Kelkaj gejunuloj sukcesis tiam okupi la dancejon por iel trem-moviĝi. Sed la tempo pasis, la jaro 2002 daŭre ŝrumpiĝis kaj proksimiĝis la jarŝanĝoj. Je la 22a horo, ni bondeziris al rusaj partoprenantoj, je la 23a al litovaj, latvaj, ukrainaj kaj israelaj partoprenantoj. Kaj je noktomezo estis la nova jaro por ĉiuj, ĉesis la muziko, ni plenigis niajn glasojn per ŝaŭm-vino kaj per tostado ni bondeziris al ĉiuj. Tintis la glaso kaj



Parade eniras la paroj laŭ la ritmo de polonezo

okazis longa interkizado kun bondeziroj por la nova jaro. Poste revenis la muziko, ne ofte facile dancebla. Iom post iom malpleniĝis la tabloj. Lastaj gedancantoj finis la balon antaŭ la 5a matene.

Jen la nova jaro 2003 kaj en la unua tago okazis la tradicia promonado de la unua de januaro, refoje sub la pluvo. Tamen multaj kuraĝe ĝin partoprenis.

En tiu familia kaj amika etoso de IF-semajnoj kreiĝas kutimoj kaj tradicioj. Kun emocio ni havis la eblecon spekti tre interesan video-filmon faritan de Liba Gabalda dum antaŭa IF en Magdeburg (2001/2002). Reaperis konataj vizaĝoj de lastjaraj partoprenantoj, iuj bedaŭrinde ĉi-jare ne ĉeestis. Ni vidis amuzajn situaciojn, ni spektis la vivon de IF-anoj de nia internacia familio. Tiel ankaŭ finiĝis IF 2002/2003.

Fine de 2003 okazos la jubilea 20a Internacia Festivalo en la nordgermana urbo KIEL. Fine de januaro 2003 jam registriĝis pli ol 80 aliĝantoj el 13 landoj. Jam estas invito al la venonta al la 20a IF.

Krome Liba Gabalda jam ekde nun invitas vin al bela AMUZA DANCVESPERO. Ankaŭ vi aliĝu al tiu granda familio de IF-partoprenantoj.

KIEL invitas vin al la jubilea 20-A INTERNACIA FESTIVALO

27 dec 2003 - 3 jan 2004

• kun plilongiga ebleco ĝis 4 jan 2004 •

La klerigejo situas en la orienta parto de la urbo, sur altaĵo, kun bela panoramo al la haveno kaj fjordo. Promene nur 800 m al la stacidomo kaj urba centro, 1000 m al la pramŝipa haveno (*Stena Line, Svedio resp. Color Line, Norvegio*), iom pli norde la pramŝipoj al Rusio kaj baltaj landoj. Tuj apud la klerigejo troviĝas urba naĝejo kun favoraj prezoj. KIEL estas landa ĉefurbo kun 250.000 loĝantoj, ligita per fjordo al Balta Maro. Famas la ĉiujara (somera, plej granda monda) velŝipa regatto. Lübeck, "reĝino de la Hanso", estos nia ekskursita celo.

Niaj ofertoj:

• jubilea rabato de 10 EUR (*) kaj sen kotizo-altiĝo en 2003

(* rabatokuponon por nia *Knaipo*, nur personoj pli ol 25 jarojn aĝaj, sendepende de aliaj rabatoj)

• jubilea vespero kun ŝaŭmvina akcepto kaj granda tombolo

(kun 20 premioj, unua premio = senkosta IF-partopreno, ĉiu aliĝinto aŭtomate partoprenos)

festu kaj jubilea kun ni en etosoplana rondo

André Grossmann



RECEPTO

Kiam karotpureo iĝas dolĉa kaj orienta saŭco ...

Jen la okazo pro kio mi hazarde elpensis tiun recepton: mi preparis pureon de karotoj kaj terpomoj por mia filineto. Kompreneble mi preparis tro da pureo por ŝi! Siatempo mi kalkulis kuiri por ni diversajn legomojn kaj fiŝfileojn. Sed kiel? Kia gusto? Kia komoro doni al la manĝaĵo?

Subite mi rememoris pri recepto de karota saŭco. Jen la ideo! La pureo povus iĝi originala kaj bona saŭco. Ene mi kuiris la legomojn. Kelkaj diversaj bongustaĵoj plibonigis la recepton (ekzemple kumino, selkonfita citrono).



Senŝeligi la legomojn kaj tranĉi etajn pecojn. Rosti ilin 1 minuto en iom da olivoleo en kuirpoto. Aldoni 1 selkonfitan citronon tranĉita en pluraj pecoj.



Iom da pureo el karotoj kaj terpomoj: Diluigi ĝin en 1/2 litero da akvo, kaj miksi kune por fari likvidan saŭcon. Aldoni 1 kulereton da zingibro kaj da salo.



Verŝi la saŭcon sur la legomoj. Kuiri ilin 15 aŭ 20 minutoj (fermu la terpoton).



Demeti la fiŝfileojn sur la legomoj. Aldoni 1 kulereton da kumino. Kuiri malrapide 5 minutoj. La manĝaĵo pretas!

Por 2 personoj

- 2 fileoj da blanka fiŝo (hipogloso, moruo...)
- 4 karotoj, 1 napo, 1/2 celerio, 1 poreo, 1 cepo, 1 terpomo
- 1 selkonfita citrono
- iom da pureo el karotoj kaj terpomoj

Legu, provu kaj bongustumu !

Florence Desbrières - Chantraine

VOJAĜO AL 6 LANDOJ

Maria Moglia, nuna lernantino en la vespera kurso en Espace 110, revenis komence de decembro 2002 el sia 6-monata vojaĝo en 6 landoj. Ŝi prezentas sin kaj rakontas ĉi-tie pri la 2 unuaj vizititaj landoj. Kaj aldone 2 fotoj el ŝia abunda rikolto.

Mia nomo estas Maria MOGLIA. Mi venas el al urbo Mulhouse en departemento Haut-Rhin. Mi vojaĝis dum 6 monatoj al 6 diversaj landoj, Argentino, Brazilo, Kamerunio, Malio, Nepalo, Vjetnamio. La vojaĝoj okazis de junio ĝis decembro 2002.

La celo de miaj vojaĝoj estis realigi foto-ekspozicion de konstruataj domoj, pontoj aŭ aliaj gravaj konstruaĵoj, modernaj aŭ tradiciaj. Tiu ekspozicio estos prezentita en Francio, unue en Mulhouse kaj poste probable en Parizo.

Mi eklernis Esperanton antaŭ 4 monatoj.

Unua lando: Argentino en junio 2002

En tiu lando mi ne renkontis esperantistojn, ĉar mi ne havis adresojn. Malgraŭ kelkaj socialaj manifestacioj pro devaluto de argentina mono, la vojaĝo bone okazis.

Kun aŭ sen rendevuo, mi povis viziti konstruejojn kaj renkonti tiam arkitektojn, inĝenierojn, laboristojn. Kelkafoje oni rifuzis al mi la aliron al konstruejoj pro sekureco.

Mi povis loĝi en malgrandaj hoteloj. Ĉar la loka mono devalutis, la kostoj estis malataj por eŭropanoj.

Dua lando: Brazilo en julio 2002

Tie mi povis renkonti esperantistojn, ĉar antaŭ la foriro mi havis interesan adreson. Tamen mi ne konis ilin. Unue mi loĝis en la domo de familio en Rio de Janeiro. La brazila asocio konatigis al mi tiun tre korvarman familion. Post aŭtoveturado de Rio de Janeiro ĝis Sao Paŭlo kaj flugado de Sao Paŭlo al Brasilia, mi restadis kelkajn tagojn en ĉi-tiu urbo. Fine mi aŭtobuse veturis de Brasilia al ALTA PARAISO je 220 km norde de Brasilia.

Kaj mi ekvidis alian mondon. Precipe je 20 km de ALTA PARAISO ekzistas centro, kie senhelpaj geknaboj estas gastigataj, nutrataj kaj ricevas bonan lernejan edukadon. La nomo de tiu centro estas la Fazenda Escola, "Bona Espero". Mi estis akceptita ege kaj eksterordinare varmkore de la responsuloj de tiu centro. Kaj dank'al ili mi konatiĝis kun Esperanto.


En la centro estis italo, franco, nederlanda paro kaj kompreneble la infanoj. Ili parolis Esperanton kaj sekvantan semajnon ili foriris al Fortaleza al la internacia Esperanto-kongreso. Eĉ kelkaj gejunuloj preparis programojn por la kongreso. Pro tio mi ekdeziris lerni Esperanton.

Mi daŭrigis la esploradon pri konstruejoj. En la modernaj konstruejoj la laboristoj surhavas kaskojn, sekurec-ŝuojn, -laborvestojn kaj -zonojn. Dume en malmodernaj konstruejoj la sekureco estas malpli respektata. Oni certigis al mi, ke ne estis pli da akcidentoj, ĉar la laboristoj estas tre lertmovaj.


Post mia reveno el Brazilo mi enskribiĝis al perkoresponda kurso. Do la baldaŭa etapo por aŭgusto kaj septembro 2002, estas Afriko kun en mia bagaĝo la Esperanto-lecioj.



Argentino



Brasilia



KALEJDO SKOPD

Filmo pri Profesoro Reinhard Selten Intervjuo kun Doktoro Rainer Kurz (IKEF 235, estrarano)



Pli malfrue ol esperite aperis 55-minuta videofilmo, en kiu Rainer Kurz intervjuas la *Nobelpremiiton pri Ekonomio 1994*.

Post mallonga impresio pri Bonn ĉe la Rejno, la tiea *Altlernejo pri Ekonomiko*, ties laboratorio, kaj la domo de prof. Selten in *Königswinter*, la videobendo pleniĝas per la tre interesa intervjuo, al kiu *Rainer Kurz* submetas la nun 73-jaran profesoron. La filmo estas sufiĉe statika, sed la enhavo de la intervjuo garantias, ke la spektanto sekvas ĝin fascinita.

Prof. Selten aperas sur la ekrano kiel ĝentila, modesta kaj trankvila persono, kiu regas sin konstante kaj singarde formulas la frazojn en perfekta Esperanto, ĉiam tenante la mienon serioza kun kelkfoja apenaŭ videbla subrideto. Nur en la lasta sekundo de la intervjuo li libere ridegas post la lasta demando de la intervjuanto.

La universitato de Bonn posedas gvidan *Altlernejon pri Ekonomio* kie studas ĉ. 1900 gestudentoj. Tie prof. Selten estras la laboratorion de eksperimenta ekonomiko. Kiel ĝia direktoro li ĝin kreis kaj plukonstruis aktive kaj inovative. En la laboratorio la gestudentoj sin ekzercas per '*decidludoj*' kiuj ludas rolan en la ekonomiaj decidoj. Ili baziĝas sur la '*ludoteorio*', nova kampo de scienco, evoluigita de prof. Selten. Li mem klarigas ĝin kiel matematikan metodon por modeligi kaj analizi situaciojn, kiuj entenas konŭikton aŭ kooperacion. Prof. Selten emfazas, ke ankaŭ ĉi tiu matematika teorio apartenas al la scienca fako. Ĝi priskribas raciajn kondutojn de homoj kaj aplikiĝas en multaj kampoj kiel ekonomio, merkatumado, politiko (koaliciigoj, elektaj kampanjoj) kaj biologio (natura selektado).

Selten ne estis la unua sciencisto kiu okupis sin pri ĉi tiu fako. Jam en 1951 ekzistis la kooperativa ludoteorio, kiu kovras la intereson de kooperativaj partoprenantoj, sed oni perdis la atenton ĝis en la sepdekaj jaroj Prof. Selten modeligis kaj ellaboris la teorion. Li faris tion tiom serioze kaj profunde, ke en 1994 li ricevis *la Nobelpremion pri Ekonomio*.

Li nun koncentriĝas je la adaptiĝo de la ludoteorio al la fakto, ke la homa konduto ne estas tiel racia kiel oni supozis, kio gvidas al la filozofia vidpunkto '*kio estas racieco*'. Ŝajnas al mi, ke la ludoteorio rilatas al la racia elektoteorio: homoj atentigas en- kaj elspezojn kaj sian propran motivadon. Involviĝas informado, kognio kaj sociaj sistemoj.

Kviete Prof. Selten parolis pri sia matematika studo, pri siaj eksterlandaj kontaktoj, pri la fakto ke li ricevas siajn bonajn ideojn dum promenadoj en la montaro. Li studis pli longe ol strikte necese, ĉar li havis tiom da aliaj interesiĝoj. Tiel li ekzemple ankaŭ psikologion studis. Kaj lia eldiro, ke oni ne atingas la celon se oni alstrebas ĝin, sed nur se oni entuziasme laboras, signifas por mi ke li ankaŭ interesiĝas pri filozofio.

Kaj kompreneble pri Esperanto!

Entuziasme sed penseme li rakontas, ke li lernis Esperanton en 1947 aŭtodidakte per folio kun la 16 reguloj kaj vortaro, kiel li renkontis sian edzinon en la Esperantomovado, pri sia rolo en la frankfurta Esperantovivo, ke li estas dumviva membro de UEA, ke li legas multon en la internacia lingvo. . .

Je demando pri la estonteco de Esperanto li akcentas ĝian propedeŭtikan valoron pro la lingva orientigo kaj deklaras, ke kvankam nenio estas certa, li forte esperas, ke Esperanto ricevos la merititan rekonon.

Li ricevis sian hororan premion pro la ludoteorio, sed el la filmo klare montriĝas, ke lia ligiteco al Esperanto ne estas pli malforta ol al lia ludoteorio. Racie li ĉion preparolas. La granda kontribuo de ĉi-tiu videofilmo estas ne nur, ke ĝi bone prilumigas simpatian Nobelpremiiton, sed ankaŭ montras, ke Esperanto meritas sian lokon en la mondo.

Germana Esperanto-Asocio, IKEF, Esperantogrupo Munkeno kaj la Esperanto-Federacio de Nova *Sudkimrio*, kiuj ebligis la aperigon de la filmo, bone komprenis tion kaj mi povas nur forte rekomendi spekti ĝin atentplene.

Tio validas ankaŭ por ne-Esperantistoj, por kiuj ekzistas subtitolitaj versioj.

Inĝ. **Kees Ruig, Malden (NL)** (IKEF 68)

Membroj de IKEF kiuj deziras pruntepreni la vidbendon, skribu al la prezidanto [f. j. braun@t-online.de](mailto:f.j.braun@t-online.de), kiu kunordigas la dissendon.

el *La Merkato*, 79 -- fonto: *ret-info* <http://www.eventoj.hu>

Ne kopiu espo-Kodiskojn !

Karaj Esperanto-muzikaj ŝatantoj,

VINILKOSMO dankas vin pro via aktiva subteno. La Esperanto-muzika kulturo vere bezonas homojn kiel vi. VINILKOSMO estas eta, sendependa, artista diskeldonejo, kiu luktas ekstreme forte por postvivi.

De la unua sono ĝis la finfina KD en la distribua katalogo kaj TTT-ejo, ĉi tie ekestas muziko de la plej alta kvalito, malgraŭ ĉiuj altegaj kostoj kaj problemoj pro nia sendependeco.

Kiel libera diskeeldonejo, ni ne povas malhavi la subtenon de ĉiuj niaj muzik-amantoj por niaj muzikprojektoj. VINILKOSMO ne havis en la pasinteco nek havas hodiaŭ sponsorojn por varbado kaj financado. Ni ne disponas pri radio kaj televido kiel ja havas komercaj muzikfirmaoj.

TIAL NIA PETO AL VI: BONVOLU KUNHELPI !



Aĉetu kaj donacu **nur originalajn ko-diskojn kaj kasedojn**. Tiel vi helpas por ke VINILKOSMO plue ekzistu. Ĉar nur tiel eblis, ke ni sukcesis postvivi krizojn ekde nia ekzisto ĝis nun.

Pro ĉiuj tiuj kialoj, ni vin petas kaj instigas
ne kopii la esperantajjn Kdojn!

Multan dankon pro via komprenemo kaj via subteno.

Vi povas viziti nian TTTejon ĉe: www.vinilkosmo.com

Floreal Martorell,
respondeculo de EUROKKA kaj direktoro de VINILKOSMO



La 4-a E-ekspozicio por Infanoj okazos en Nankino



Por disvastigi kaj instigi uzon de Esperanto inter tutmondaj infanoj, ni, *Nanjing Zamenhofa E-Klubo*, okazigos la 4-an E-ekspozicion por infanoj en **Nanjing**, en la **1-a de junio 2003** (Internacia Infantago).

La ĉifoj ekspozicia ĉeftemo estas "*Instruado pri Esperanto kaj Ekspluatado pri Potencialpovo por infanoj*"

.Bonvolu sendi, laŭ siaj eblecoj, gratul-leterojn, poŝtmarkojn, bildkartojn, ilustraĵojn, pentraĵojn, fotojn ktp.

Adr: **Zhuang Rui** *** 402/14 Jiao Fu Ying, Fuzimiao; **Nanjing CN-210001**, Jiangsu; Ĉinio
aŭ rete zhuangespero@sina.com.

Dankon!

*** NB - Rui, apenaŭ 10 jara., bonvenigis la redaktoron de "La Informilo", per bela kanzono en esperanto, okaze de familia recepto en Nankino !



Anonco dissendota al la tuta Esperantujo

Serĉas ĉiulandajn esperantistajn desegnantojn kaj komiksistojn, por projekto rilatanta humuron kaj komiksojn (bildstriojn) en Esperanto. Se vi estas (aŭ konas iun tian) interesata, bonvolu skribi al la jena retadres:

hodos@free.fr

Por tiu projekto, ni vere bezonas esperantistojn el multaj landoj. Eĉ se vi ne estas interesata pri la projekto, bonvolu disvastigi tiun anonceton tra la tutmonda esperantistaro, antaŭdankegon.

Jen nova havinda verko de André CHERPILLOD



Membro de la *Akademio de Esperanto*, laŭreato siatempe de la fama franca priortografa evento "Dico d'Or" ("Ora vortaro"), nia erudicia samideano senlace riĝigas la esperanto-kulturon, aperigante regule originalan verkon, kiu aldoniĝas al jam ampleksa listo da libroj, kiuj kuŝas sur la libro-breto de ĉiu scivolema esperantisto, kaj famigas la aŭtoron jam de multaj jaroj.

Jen frukto de tridekjara laboro: la *Konciza Etimologia Vortaro* entenas ĉiujn komunajn vortojn de la unua *Plena Ilustrita Vortaro* kaj ankaŭ multajn vortojn troveblajn dise en diversaj verkoj aŭ vortaroj.

Eldonita de UEA, ĝi ankaŭ estas havebla ĉe nia libroservo (19,80 €). 520 paĝoj

- abdi³. L abdiĉare ← āb «de, el» + diĉare «solene proklami» ← diĉere «diri».
- abdomeno. L abdōmĕn ← abdĕre «kaŝi, malproksimigi». ☞ ab-, doni.
- abduk³cio. L abductio ← abdūcere «forpuŝi» ← āb «de» + dūcere «konduki».
- abdukti^{0J}. L abductum, supino de abdūcere «forpuŝi». ☞ dukto.
- abduktoro. L abductōr ← abdūcere «forpuŝi». ☞ dukto.
- abelo^F. F abeille ← Oc P abelha ← L āpicūla «abeleto» ← āpis «abelo» ← Ĥ bhei. • Ĥ → G Biene, Nd bij, A bee, Sv bi, Ir beaĉ, Li bitĕ, Eg bit, Vp bien.

Antaŭparolo (11 paĝoj) klarigas tre detale la „estiĝon“ de tiu ampleksa vortaro.

La aŭtoro prudente avertas: „*nepre legenda antaŭ uzado*“

Al niaj legantoj, kiuj jam abonis (senpage !) « la vortaron »...
(Komuniko de la responsulo Bernard VIVIER)



“Mi sendas al vi la liston *Esperanto-Brazil-Portugala*, al kiu mi aldonis preskaŭ 1000 enirvortojn.

Ĉar mi ricevis raporton de samideano, kiu ne povas vidi la tildojn(~), mi anstataŭigis ilin por steletoj(*).”

Jen eltiraĵoj de la mesaĝo, kiun ni ricevis de nia kunlaboranto el Brazilio: *Antonio Luís Lourenço Dos Santos*, kiun ni multe dankas pro lia grandega laboro.

Nepre vizitu la TTT-ejon de la **Pinarba Esperanto Grupo**, kiun prizorgas Antonio Luís, kaj kie vi trovos la brazilan version de **La Vortaro**: *Alls Dicionário, Karaokeon en Esperanto, Krucenigmajn ktp*,

<http://www.rantac.com.br/users/alls>

Elŝutu la novan vortliston ĉe la kutima adreso :

<http://www.la-vortaro.net>

Kiam vi instalos ĝin, la malnova estos aŭtomate anstataŭigita. Dank'al nia reakirilo, vi retrovos viajn proprajn aldoniĝojn.


Ĝis baldaŭ !

Bernard(o)

... al niaj fidelaj legantoj de Loreno kaj Alzaco, al niaj kuraĝaj komencantoj,
à nos amis sympathisants... Vizitenda hejma-paĝo! Un site à visiter, votre site!...

www.chez.com/esperantofranceest

Renkontiĝoj per ondoj kaj... Ĉu vi kredas je koincidoj?



La membroj de **I. L. E. R. A.** (*Internacia Ligo Esperanto RadioAmatoroj*) rendevuas per ondoj, uzante frekvencojn 3, 666 ; 7, 066 ; 14, 266 ; 21, 266 Megahertzoj (Mhz)

Okazas renkontiĝoj inter **RadioAmatoroj (R. A.)**, kiuj interŝanĝas informojn, aŭ babilas. La plezuro kreskas, kiam oni havas okazon paroli kun amikoj, kiuj loĝas longdistance de ni

Ekzemple: amiko Tormod, LA8RU (Norvego), kiu elsendas de ANDOY insulo, 275 kilometrojn norde de la polusa cirklo. Amiko Vaske, (Brazilano) PY3ACE, kiu, poste, sendis al mi kelkajn ekzemplerojn de la poŝtkarto eldonita por reklami Esperanton okaze de la Centjariĝo en 1987. Kaj ankaŭ amiko CE4JLK (Āiliano), Hektor Campos Grez, kiun mi kontaktis la 17an de novembro 1990. Jen estas koincido: mi estis leginta informon pri li. . . Kie ? Divenu! Jes !... en la bulteno 6-a de aŭgusto 1989 ! Oni skribis pri li, ĉar la temo de la tezo prezentita de li por fariĝi advokato estis : *Esperanto kaj internaciaj rilatoj*. De li mi plezurege ricevis komfirmkarton! ¹ Kaj ankaŭ amiko Tai BY5HE (Āinio), kiun mi kontaktis okaze de *Internacia Esperanta Konkurso*. li sendis al mi komfirmleteron skribita sur tre malpeza "riza-papero"!

Kaj, nun, alia koincido !

En la jaro 1989, ofte en la "esperanta-rondo", mi kontaktis amikon Sjoerd, PA3FLC (Nederlandano), kiu loĝis ĉe amiko F6AUW Jacques (Esperanto parolante, kompreneble !) kaj studis en Universitato en Grenoble.

Nun mi traktas la temon "koincido"... Atente legu kaj sekvu!...

Unue: feriante en la montaro "Altaj Alpoj", mi respondis ĝeneralan alvokon (franclingve) de F/PA3CIE/M (M signifas „movebla“, kiu vojaĝis (veturis) apud mia feria loko. Estis la 17an de julio 1988, je la 9 :20. UT. Mi estis en *Altaj Alpoj*...


Due : la 27an de septembro 1989, **tuthazarde**, sur frekvenco 14, 133 mhz, je la 16 :30 UT, mi kaptis ĝeneralan alvokon (franclingve) de PA3CIE Mi respondis. Dum la konversacio, li diris, ke li ŝatas vojaĝi en Francio, precipe en Alpoj. **Mi:** *Eble ni jam interkontaktis ? Ĉu vi estis sur la vojo apud Briançon en julio 1988 ?* **Li:** *Jes !* **Mi:** *mi estas kontenta pro tiu koincido, kiu ebligas min denove paroli kun vi, despli ke vi bone parolas la francan lingvon ! Nur Esperanton mi parolas. . .* **Li:** *ankaŭ mia filo parolas esperanton. . .* **Mi:** *Ĉu eble li nomiĝas Sjoerd ?* **Li:** *Jes!!* **Mi:** *Mi povas aserti al vi, ke via filo bone fartas, kaj ŝatas loĝi kaj studi en urbo Grenoble, ĉar hodiaŭ matene, mi kontaktis lin en la Esperanta reto, frekvenco 7, 066 Mhz!!!*

Agnosku, ke okazis stranga koincido, kiu ebligis **min samtage, sen anticipa rendevuo, renkonti sur la ondoj la patron kaj la filon !**

Poste, mi denove kontaktis Sjoerd. Kompreneble, ni interŝanĝis komfirmkartojn kaj leterojn! Sekve, ni invitis lin tranokti ĉe ni. Li biciklis de Grenoble ĝis Draguignan kaj alvenis la 20an de februaro 1990. Poste mi eksciis, ke li respondecis pri **TEJO !**

Konkludo : radioamatorismo same kiel esperanto ambaŭ generas "**amikecon sen limo**"

(1) la gentileco inter R. A. postulas sendon de kuriero por konfirmi la cirkonstancojn de la radiokontakto. La komfirmkartojn vojaĝas per la « diplomata valizo »



redaktita de **F5NAQ GILBERT**
Draguignan

☆☆☆☆☆

Multaj el niaj legantoj verŝajne havigis al si la duan eldonon de la **Plena Ilustrita Vortaro**...

Jen ne nur atentinda sed ankaŭ konkretiĝinda ideo : donaci la unuan eldonon, kiu tutcerte kaj multnombre kuŝas sur faka breto de nia biblioteko, al provizore "nepagipova" samidean(in)o... Tiu propono ĵus aperis sur diversaj TTT-ejoj. Jen okazo elmontri nian solidarecon sen landlimoj !

☆☆☆☆☆



Ek de nun
konsultebla
ĉiutage !

La dancistino MATA HARI

En jaro 1905 la unuan fojon ekbrilis en Parizo sur la scenejo de ia nokta entrepreno la ĉarma dancistino MARGARETHA, knabino de nekonata ĝis misterplena deveno, ĉar ŝi volis al neniu malkaŝi, de kie ŝi en Francion venis. Ŝi lasis nomi sin MATA HARI, kio signifas en traduko el japana lingvo "la lumo de tago", kaj scipovis per sia danco ekinteresiĝi multe da viroj, sed ankaŭ per sia korpo, kiun ŝi ofte malvualis. Ĉe unu el siaj dancoj ŝi surpaŝis la podion kronita de buntaj tuketoj. Ĉe la kanzono ŝi ilin malrapide deponadis ĝis la momento antaŭ ol la kurteno falis, ŝi restis tute nuda. Tiutempe estis tia danca elemento tre aŭdaca, ĝi havis multe da kontraŭuloj, sed samtempe same tiom da favorantoj.

MATA HARI fariĝis ne nur famekonata dancistino, sed ankaŭ hetajro de riĉaj viroj, precipe de la politikistoj kaj altrangaj milit-oficiroj. Kaj ĝuste la maniero de parada vivo sen devoligo ŝin gvidis antaŭ la juĝproceson, kiu fariĝis en la historio de homaro la plej pridiskutata, la plej famekonata limŝtono de monda justeco. Ĝi indikis MATAHARI-on kiel germanan agenton. Kulpis unu el la amantoj, la germana ataŝeo von KALE, kiu la dancistinon pridonacadis kaj financis ŝin el germana ŝtata konto. Tial li ŝin enskribis en la liston de siaj spionoj.

MATA HARI antaŭpaŝis la juĝproceson kaj finfine malkaŝis sian identecon. Ŝia vera nomo: Margaretha Geertruiky Zelle, naskiĝo 7.8.1876 en norda nederlanda urbo LEEUWERDEN. Ian tempon ŝi vivis kun sia edzo en Java, sed baldaŭ revenis en Nederlandon, eksedziniĝis kaj restis sola kun sia filino, por kiu estis necese prizorgi la vivtenon. Ŝi decidigis por la kariero de dancistino kaj volis esti tiu la plej bona, tial ŝi lotmetis je sia ĉarma vizaĝo kaj bone kreskinta korpo. Sed tiom malproksimen tio ne devis atingi! Si estis erare kulpigita kaj krom tio ŝin forlasis ĉiuj geamikoj kaj amantoj. La militjuĝo malhonorigus ilian karieron, tial ili strebis per siaj eldiroj defendi sian honestecon! Kial bedaŭri, ke velkos la honesteco kaj famo de unu virino, kiu propre proponis sian korpon vendecele? Venos la aliaj kaj pli belaj! MATA HARI indikis la direkton, kiun ili povos sekvi.


La juĝo eldiris - eĉ malgraŭ tio, ke la prezentitaj pruvoj ne estis konkretaj kaj kompletaj - la plej kruelan verdikton - la morton per mortpafo.



Mata Hari

La 15.10.1917 ŝi estis kondukita en la arbaron Vincennes apud Parizo en akompano de ekzekuta trupo, kiu devis realigi la destinitan punon. Dekdu viroj ŝin konis kiel dancistinon kaj afablan kunulinon, kiu en tiu-ĉi momento kritika konservis sian seriozecon. Ŝi marŝis kuraĝe en nigra vestaĵo kaj ĉapelo kun larĝa rubando, kiun oni al ŝi permesis preni por la ekzekuto. Kiam oni ŝin ligis al la paliso, ŝi rifuzis la strion sur la okuloj. "Mi volas rekte rigardi la morton" ŝi proklamis. Ŝi rigardis rekte en la okulojn de la dekdu viroj, kiuj al ŝi celis. Tial ŝin trafis en la koron nur unu kuglo. Nur unu soldato deflankiĝis de ŝia ensorĉa rigardo, per kiu ŝi rompadis la korojn de plej parto de la viroj, kaj akurate li ekcelis. La aliaj pafis flanken.

Jiří Ros (Spirit) tradukis Jací



Finigis la Abon-periodo 2002

Atentu: ekde
2003 la abono
al La Informilo
estas 12 eŭroj

La abon-periodo 2002 jam finiĝis per la lasta numero 120. Ĉi-tiu numero 121 jam estas la unua de la jaro 2003. Ĝi estas la lasta sendita al ĉiuj malnovaj abonintoj. La venontan numeron 122 ricevos nur la abonantoj de la jaro 2003. La adres-etikedo de via **Informilo** informas vin per la mesaĝo "**Lasta Numero!!**", ke vi ankoraŭ ne pagis vian abonon al **La Informilo**. Se efektive tia mesaĝo troviĝas sur ĝi, tiam bonvolu senprokraste pagi vian abonon laŭ la ĉi-suba tarifo.

La unua linio antaŭ la adreso konsistas el la adreso-kodo, la abon-jaro, pago (A=abonanto, F=federacia membro, poste UFE UEA ktp.) kaj eventualo pago por la sekvanta jaro 2004.

JAROJ:	2003	2004	2005
Abonoj por adresoj en Francio:	12 eŭroj	12 eŭroj	12 eŭroj
Abonoj por adresoj ekster Francio:	16 eŭroj	16 eŭroj	16 eŭroj
Federacia kotizo:	5,50 eŭroj	5,70 eŭroj	6 eŭroj

Vi povas pagi la koncernan sumon:

1. Per ĝiro al la poŝtĉekonto de nia Asocio:

Esperanto France-Est poŝtĉekonto 1997 72W NANCY

Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo.

La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto:

ekzemple: abono Informilo + kotizo 2003 por 1036

2. Per bankĉeko aŭ poŝtĉeko je la nomo de Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY sendita al jena adreso:

S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio

Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, al Inter Ni, kotizo, disko, donaco al ktp

Se necese menciu vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.

3. Per ĝiro al la jena poŝtbankkonto en Germanio (Karlsruhe):

Je la nomo de: TAKE, kont-numero: 3393 48-758 BLZ 660 100 75.

(se vi estas nova abonanto, menciu vian kompletan adreson sur la ĝirilo aŭ informu nin aparte).


La kasisto: André Grossmann



Dum la Ĝenerala Asembleo de la 20a de oktobro 2002 okazinta en Villers-lès-Nancy, la komitato decidis plialtigi la abonon al La Informilo. De 2000 ĝi estis kaj restis je 10 eŭroj, tamen kreskis la elspezoj por presado kaj dissendado. Ek de 2003 la abono estas je 12 eŭroj. La komitato kontrolas la financon evoluon de nia bulteno.

<i>Inter Ni</i>	Eblas samtempe pagi vian abonon por 2003 al la malagasa revuo <i>Inter Ni</i> laŭ la jenaj tarifoj. Novaj abonantoj ricevos la lastan numeron de 2002	
Subtena abono		18 €
Simpla abono		14 €
Abono en nepagi-povaj landoj		10 €

NI PROVU RIDETI !



Ĉe la jarfino, direktoro de granda magazeno petis detalitan raporton de la dungitoj, pri la maniero laŭ kiu ĉiu deĵoris dumtage.

La liftisto simple respondis: „Supreniroj: 50%... kaj malsupreniroj: 50%“.

“ Mi volis voki cin plurfoje el mia laborĉambro , diras tiu sinjoro al sia edzino, sed ĉiujfoje mi konstatis, ke la linio estis okupata...

- Tio ne mirigas min ! Mi telefonantis al mia amikino Johanino, kaj vere tiu ino estas unika !... Ĉe la telefono, ŝi kapablas aŭskulti min dum horoj ! ”

Iu maljuna viro sonoras ĉe pordo de kazerno...

„Mi deziras saluti mian nepon, kiu plenumas soldatservon ĉi tie... - Vi alvenas tro malfrue. Li foriris hodiaŭ matene por ĉeesti vian entombigon!... “

Feritempo sur plaĝo...

„Imagu, sidiĝis apud mi junulino, kiu dediĉis sian tute mudan korpon al la sunradioj, apenaŭ kaŝita per gazeto!... “

- Hum! Supozeble vi aprezis la aferon?

- Tion ne kredu! Temis pri ĵurnalo de la pasinta semajno!“



En Skotlando, iu virino vokas sian edzon telefone:

„Sean, rehejmiĝu rapide! Ĵus eniris la domon verdaj etuloj! Ili posedas ses brakojn kaj elirigas voĉe kvazaŭ muzikajn sonojn... “

- Mi tuj alvenos! Provu ilin pacienciĝi!

- Nu, nenia problemo! Jam de kvaronhoro, ili konversacias kun via kornemuzo!... “

Iu libro-tenisto vizitas fakkuraciston.

“Mi vere ne plu povas elteni... Mi pli kaj pli malfacile endormiĝas !

La kuracisto elvokas unue sendanĝeran rimedon :

“Ĉu vi jam provis nombri ŝafojn ?

- Jen la problemo ! Se mi eraras dum la nombrado, mi bezonas pli ol unu horon por trovi la mankantajn aŭ troajn bestojn !”




Du amikoj prialudas sian propran papagon...

„Vidu, la mia kapablas respondi en tri lingvoj je demando: france, hispane kaj germane!

- Ĉu vere? La mia, femalo, daŭre silentas, sed mirigas la bestkuraciston... Ŝi ellasas ovojn kubformajn!

- Strange ja! Sed silenta papago ne ekzistas!

- Hum, fakte, fojfoje kiam ŝi ovumas, ŝi ekkrias.... Aj!



Ĉe stirilo de sia veturilo, blondulino okulumas al skipo da fak-policistoj, kiu ŝargas ĝenantan aŭton sur la specifan kamioneton...


Iu viro alproksimiĝas kaj scivole: demandas:

„Kion vi atendas?



- La liberigotan lokon.. “



bof!



DISTRANGULO



Gratulon al S-inoj BICHE kaj GINGOIN el TROYES, solvintaj de la jarfina konkurso (enigmoj 120...).

Ambaŭ ricevis premion sub formo de libro, kiel anoncite.

PS – Tiu vinjeto (ge-uloj !) simbolas ĝojon kaj ne personigas la premiitinojn!...


Silab-enigmo

Helpe de la vort-elementoj ĉi-sube alfabete ordigitaj, malkovru vortojn, kies difinoj troviĝas dekstre. la du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, elformas diraĵon de Zamenhof

ab ad ag aj at bi bi bro bu ce do do do el elo fio gir ik im klo klo lan lar li lo lu mo mo ni ne no or put ra re ro ro sa so so st stro ti te to tu


- 1 + - - + - - faka psika energio
- 2 + - - + - - haŭta flavigo
- 3 + - - + - simpatia insekto
- 4 + - - + - ofta rezulto de ĉagreno
- 5 + - - + - - - - kunigi gluante
- 6 + - - + - - tre bezonata
- 7 + - - + - - - - ornama kunplektaĵo
- 8 + - - + - - osta kavo
- 9 + - - + - fasketo da haroj
- 10 + - - + - - - malkresko de organo
- 11 + - - + - atomnumero 35
- 12 + - - + - - - ekpuŝo de fizika forto
- 13 + - - + - - franca regiono
- 14 + - + - - - - urbo de kongreso (UK)
- 15 + - - + - - ia tavolo da nuboj
- 16 + - - + - - - monaĥ(in)ejo

Tiu virino plendas ĉe ĝardenbutiko...
 “La sterkaĵo por verdaj plantoj, kiun mi aĉetis antaŭ kelkaj monatoj estas vere tro potenca !
 - Nekredeble, replikas la vendisto.. Neniam oni tion riproĉis al mi !
 - Nu, imagu, ke mia edzo, kiu iun nokton ellitiĝis por elpreni sian medikamenton, eraris kaj englutis la likvaĵon !...
 - Ĉu li iĝis grave malsana ?
 - Ne temas pri tio... Sed mi ĵus eksciis, ke mi atendas triĝemelojn !”



Mistera krado

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13
L	A	A	I	I	A	A	L	A	A	F	I	A
N	C	O	N	N	C	A	T	A	E	N	L	E
R	I		S	O	L	I		I	G	O	M	E
S	O		S		M	L		M	L	R	R	E
S	T		T		O	N		P				I



Transigu la vertikale alfabete ordigitajn (en siaj kolumnoj) literojn, de la supra krado al la malsupra. Vi povos legi penson de la franca humoristo Jean Amadou.

Solvoj de la lastaj enigmoj (120)



- 1/ - “silab”-enigmo :
tra unu orelo eniras,
tra la dua foriras (Z.-proverbo)
- 2/ - mistera krado :
cerbo ne necesas por ritme piedmarŝi
laŭ milita muziko; nur mjelo sufiĉas
(Enstejn)